



Tutmonda Biblioteko je la
memoro de L. Tolstoj.

..... № 8

SIEĜO DE SEBASTOPOLO.

RAKONTO DE
L. TOLSTOJ.

Tradukis el rusa lingvo

N. Kabanov.

ELDONO № 1054 DE LA FIRMO
„POSREDNIK“ (PERANTO).

ОСАДА СЕВАСТОПОЛЯ. Льва Толстого.

ВЪ ПЕРЕВОДЪ НА ЭСПЕРАНТО.

Издание „ПОСРЕДНИКА“.

Moskvo. 1912.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.

POR KIO ESTAS ELDONATA „TUTMONDA BIBLIOTEKO JE
LA MEMORO DE L. TOLSTOJ“.

„Unu animo en ĉiuj“—vere diras L. Tolstoj. Tial ĉefa tasko de homa vivo estas ĉiam pli granda frata unuiĝo de homoj, de gentoj kaj de popoloj kaj, plue, unuiĝo de ĉio vivanta sur la tero.

Nia eldona firmo „Posrednik“ (Peranto), kiu estas fondita de L. Tolstoj en 1885 jaro, kaj kiu nun estas esperantia entrepreno, starigis kiel sian taskon eldonadon de libroj, disvastigantaj ideojn de la frata unuiĝo de homoj kaj de ĉio vivanta en mondo. Pro tio, ke la internacia lingvo Esperanto estas kreita nome por tia celo de la unuiĝo de homoj de ĉiuj gentoj kaj popoloj, nia eldona firmo nun komencas eldonadon de libroj en lingvo Esperanto.

Plej alta, plej ĝojiga unuiĝo de homoj estas unuiĝo en komunaj sentoj de frateco, de amo, de heroa kaj modesta ĉiutaga sindonemo, de kompatemo rilate al ĉiuj vivaj estaĵoj, de frata kunhelpado kaj kunlaborado de homoj por komuna bono. Pro tio libroj de esperanta fako de nia eldona firmo estos celantaj ĉefe disvastigadon de tiuj ĉi sentoj, de tiuj ĉi ideoj.

Serio de niaj esperantaj eldonaĵoj estas nomata „Tutmonda Biblioteko“ kaj estas dediĉita al la memoro de nia amiko Lev Nikolàeviĉ Tolstoj, granda predikanto de la unuiĝo de ĉiuj vivoj en mondo.

Komencante tiun ĉi aferon, ni forte esperas subtenadon de ĉiuj, kunsentantaj al la afero. Tiu ĉi subtenado povas esprimiĝi en komunikadoj al ni de verkoj kaj de artikoloj, presitaj en iaj ajn lingvoj kaj plej konformantaj al la fundamentaj ideoj de „Tutmonda Biblioteko“, kaj en helpado de kiel eble plej vasta disvastigado de libretoj de „Tutmonda Biblioteko“ en ĉiuj landoj, kie estas uzata la lingvo Esperanto.

Amikoj en ĉiuj landoj! akceptu saluton de nia frata amo. Ni laboru amike kune por komuna sankta al ni celo.

Ĉefa redaktoro-eldonanto de firmo „Posrednik“

I. Gorbunov-Posadov.

Moskvo, Arbat, 36.

Tutmonda Biblioteko je la memoro
de L. Tolstoj.

№ 8.


SIEĜO DE SEBASTOPOLO.

RAKONTO DE

L. Tolstoj.

Tradukis el rusa lingvo

N. Kabanov.



ELDONO DE LA FIRMO

„POSREDNIK“ (PERANTO).

№ 1054.

Moskvo, 1912.

Tiu ĉi esperanta serio estas redaktata de d-ro N. Kabanov.



SIEGÔ DE SEBASTOPOLO.



Гипо-литогр. Т-ва И. Н. КУШНЕРЕВЪ и К°. Пименовская ул., с. д.
Москва — 1912.

SEBASTOPOLO EN DECEMBRO DE 1854 JARO.

Matena ĉielruĝo ĵus komencas kolorigi ĉielon. Malvarmo kaj nebulo portiĝas de golfo. Neĝo ne estas, ĉio estas nigra, sed matena frosto kaptas vizaĝon kaj krakas sub piedoj, kaj sola malproksima bruoj de la maro rompas mallaŭtecon de la mateno.

Sur norda flanko de Sebastopolo taga laboro komenciĝas iom post iom: ie deĵorsangantoj pasas, tintante per pafiloj; ie doktoro jam rapidas malsanulejon; ie soldato elrampis el terloĝejo, lavas sunbruniĝintan vizaĝon per glacia akvo kaj, sin turninte orienten, rapide farante krucajn signojn, preĝas al Dio; ie alta multpeza maĝaro (tatara veturilo) kun kameloj traveturis kun knarado tombejon por enterigi sangokovritajn malvivulojn, per kiuj ĝi estas plenigita preskaŭ ĝis supro... Mi aliris al havena albordiĝejo,—specialaodoro de ŝtonkarbo, de sterkaĵo, de malsekaĵo kaj de viando frapis min; miloj da diversaj objektoj—hejtlignoj, viando, „turoj“ (korboj, plenigitaj per tero,—el ili oni konstruas murojn de teraj fortikaĵoj), faruno, fero k. t. p. amase kuŝas apud

la albordiĝejo; soldatoj de diversaj regimentoj, kun sakoj kaj pafiloj, sen sakoj kaj sen pafiloj, amasas ĉi tie, fummas, interinsultas, transportas ŝarĝojn sur vaporsipon, kiu, eligante fumon, staras apud podio; privataj jalikoj (malgranda ŝipeto), plenaj je diversa popolo — soldatoj, ŝipanoj, komercistoj, virinoj — albordiĝas kaj debordiĝas apud la albordiĝejo.

— Via moŝto, sur Grafan (albordiĝejo en Sebastopolo) se plaĉas al vi! — krias du aŭ tri ekŝiĝaj ŝipanoj, sin levante en jalikoj.

Mi elektis tiun, kiu estis pli proksima, transpaŝis trans duonputrinta kadavro de ia ruĝobruna ĉevalo, kiu kuŝas tie ĉi en koto apud ŝipeto, kaj pasis al direktilo. Ni debordiĝis. Ĉirkaŭe estas la maro jam brilanta je matena suno, antaŭe sidas maljuna ŝipano en kamellana supervesto kaj juna blondhara knabo, kiuj remas silente, fervore. Ŝipoj kaj ŝipetoj estas dismetitaj ĉirkaŭe; kaj malamikaj ŝipoj vidiĝas malproksime en la maro.

Ni albordiĝas al Grafa albordiĝejo, kie amasas jam multaj diversaj ŝipetoj.

Sur la kajo brue movetiĝas amasoj da grize vestitaj soldatoj, nigre vestitaj ŝipanoj kaj diverskoloro vestitaj virinoj. Virinoj vendas bulkojn, viroj kun samovaroj krias: varmegan sbitenon (rusa miela zingibra trinkaĵo)! kaj ĉi tie, sur unuaj ŝtupoj, senorde kuŝas rustiĝintaj kuglegoj, bomboj, kartoĉoj kaj paflegoj el fandita fero; iom pli malproksime estas granda placo, sur kiu senorde kuŝas iaj grandegaj ŝtipoj, pafilegaj stabloj, dormantaj soldatoj, staras ĉevaloj, veturiloj, verdaj kestoj kaj pa-

flegoj; moviĝas soldatoj, ŝipanoj, oficiroj, virinoj, infanoj kaj komercistoj, veturas veturiloj kun fojno, kun matsakoj kaj kun bareloj; ie trarajdas kazako kaj oficiro, traveturas generalo. De dekstra flanko strato estas barita per paflegoj, kaj ĉirkaŭ ili sidas ŝipano, fumante pipon. Maldekstre, apud domo, staras soldatoj kaj sango-kovritaj portiloj, — malamikaj postsignoj de la milita tempo estas vidataj ĉie.

Komence ŝajnis al mi, ke ĉiuj estas timigitaj, maltrankviliĝas, ne scias, kion fari. Sed kiam mi enrigardis pli proksime vizaĝojn de tiuj-ĉi homoj, mi komprenis ion tute alian. Jen soldato kondukas ian ruĝebrunan ĉevaltrion por trinkigi kaj tiel trankvile murmuris ion, ke, videble, li ne perdis vojon en tiu ĉi homamaso, sed plenumas sian aferon tiel same trankvile, kiel dum paca tempo. Tio sama estas vidata sur vizaĝo de oficiro, kiu preterpasas, kaj sur vizaĝo de ŝipano, kiu fummas, sidante apud paflego, kaj sur vizaĝo de soldatoj laboristoj, atendantaj kun portiloj sur perono de malsanulejo, kaj sur vizaĝo de tiu ĉi virino, kiu, ne timante malsekigi sian veston, transsaltetas straton laŭ ŝtonetoj.

Vane mi serĉis maltrankviliĝon, konsterniĝon aŭ pretiĝon al morto, — nenio ĉi tio estis; mi vidis homojn, trankvile sin okupantajn je sia ĉiutaga afero. Sed mi ekvidis tie ne ĉiutagajn simplajn aferojn, sed terurajn, malĝojajn, miregindajn scenojn.

Mi eniris grandan ĉambron. Apenaŭ mi malfermis pordon, vido kaj odoro de kvardek aŭ kvindek plej malfa-

cile vunditaj malsanuloj,—unuj sur litoj, aliaj pleje sur planko—subite frapis min. Al mi fariĝis malagrabla, kaj kvazaŭ mi ekhontis, ke mi ekiris por rigardi suferulojn, sed mi rememoris, kiel malfeliĉaj homoj ŝatas, kiam oni vizitas ilin, kiel ili amas rakonti pri siaj suferoj kaj aŭdi vortojn de amo kaj de kompato, kaj mi eniris.

— Kien vi estas vundita? hezitante kaj timeme mi demandis unu maljunan malgrasiĝintan soldaton, kiu, sidante sur lito, bonanime rigardis min kaj kvazaŭ invitis aliri al li.

— Piedon,—respondas la soldato.—Kaj mi rimarkis laŭ faldeĵ de litkovrilo, ke la piedo estas amputita pli supre ol genu.—Dank'al Dio nun,—li aldiras:—mi volas forlasi malsanulejon.

— Ĉu antaŭlonge vi estis vundita?

— Jen, sesa semajno pasas, via moŝto.

— Ĉu doloras nun via piedo?

— Ne, nun ĝi ne doloras; nur ĝi doloretas kvazaŭ en tibikarno, dum malbona vetero...

— Kie vi estis vundita?

— Sur kvina bastiono, via moŝto, kiam estis unua bombardado: mi ekcelis paflegon, komencis deiri, kaj io ekbatis min je la piedo, kvazaŭ mi faletis per unu piedo en kavon,—mi rigardas, la piedo malestas.

— Ĉu efektive ne estis dolore ĉi tiun unuan minuto?

— Ne; nur kvazaŭ per io varmega oni puŝis min je la piedo.

— Kaj poste?

— Kaj poste ankaŭ ne estis dolore. Nur kiam oni komencis surtiri haŭton, kvazaŭ bruldoloretis. Ĉefa afero estas, via moŝto, pensi nenion; se oni ne pensas, nenio sentiĝas. Pleje ĉio estas de tio, ke homo pensas.

Dum tiu ĉi tempo aliris al mi virino, en griza vesto, kun nigra tuko sur la kapo; ŝi enmiksiĝas en mian interparolon kun la ŝipano kaj komencas rakonti pri li kaj pri tio, kiel terure li suferis tutajn kvar semajnojn.

— Ĝi estas mia edzino, via moŝto! diras la ŝipano kun tia mieno, kvazaŭ li diras: „Vi jam pardonu ŝin. Certe, la virino kortuŝiĝis“.

— Nu, Dio donu al vi resaniĝi pli baldaŭ,—kaj mi aliris al alia malsanulo. Li kuŝis sur la planko kaj, ŝajnis, atendis morton en netolereblaj suferoj.

Li kuŝis sur dorso, forĵetinte malantaŭen la maldekstran brakon. Lia pala vizaĝo havas mienon de grandaj suferoj; la seka malfermita buŝo malfacile eligas stertorantan spiradon; bluaj senmovaj okuloj estas suprenrulitaj, kaj el-sub litkovrilo elstariĝas restaĵo de la dekstra brako, ĉirkaŭvolvita per ĉifonoj. Malbonodoro de kadavro frapis min, kaj konsumanta interna varmego de la suferulo kvazaŭ eniĝas ankaŭ en min.

— Ĉu li estas sen konscio?—mi demandis la virinon, kiu iras post mi kaj rigardas min afable, kiel parencon.

— Né ankoraŭ, li aŭdas, sed lia stato estas tre danĝera,—ŝi aldiras murmurete.—Mi trinkigis lin hodiaŭ per teo: kvankam li estas malparenca por mi, tamen necesas havi kompaton,—sed li preskaŭ ne trinkis.

— Kiel vi sentas vin?—mi demandis lin.

La vundito turnas okulojn al mia voĉo, sed ne vidas kaj ne komprenas min.

— Brulas en koro...

Iom pli malproksime mi ekvidis maljunan soldaton, kiu ŝanĝas tolaĵon. Lia vizaĝo kaj korpo estas de ia bruna koloro kaj malgrasaj kiel skeleto. Tuta brako mankas; ĝi estas amputita en humera artikolo. Li ridas vigle,—li resaniĝis.

De alia flanko mi ekvidis sur lito suferoplenan, palan kaj delikatan vizaĝon de virino; sur la vizaĝo estas febra ruĝo je tutaj vangoj.

— Ĝi estas ŝipanedzino; antaŭnelonge bombo trafis ŝian piedon,—diras al mi tiu virino, kiu iris post mi.—Ŝi estis portanta tagmanĝon al la edzo sur bastionon.

— Ĉu oni amputis?

— Oni amputis pli supre, ol genu.

Mi pasis maldekstren tra pordo: en tiu ĉambro oni bandaĝas kaj operacias. Mi ekvidis tie kuracistojn kun brakoj, sangokovritaj ĝis kubutoj, kun palaj malgajaj vizaĝoj; ili sin okupis apud lito, sur kiu kuŝas vundito, kun malfermitaj okuloj, parolanta, kvazaŭ en deliro, sensencajn, iafaje simplajn kaj kortuŝantajn vortojn. La kuracistoj sin okupas je abomena, sed bonfara afero. Akra kurba tranĉilo eniĝas en blankan sanan korpon: la vundito subite rekonsciĝas kun terura krio, disŝiranta animon, kaj kun malbenoj; mi ekvidis, kiel kuracista helpanto ĵetis en angulon la detranĉitan brakon; mi ekvidis, kiel alia vundito kuŝas sur portilo en la sama

ĉambro kaj, rigardante la operacion de la kamarado, tordiĝas en konvulsioj kaj ĝemas ne tiom pro doloro, kiom pro atendo,—mi ekvidis terurajn frapantajn scenojn.

Elirante el tiu ĉi domo de suferoj, mi eksentis trankviliĝon, mi enspiris pli profunde freŝan aeron, eksentis mian sanon, sed kune kun tio, rememorante la suferojn, mi eksentis mian sensignifon.

„Kion signifas morto kaj suferoj de tia sensignifa vermo, kiel mi, kompare kun tiomaj mortoj, kun tiomaj suferoj?...”

Mi ekiris bastionojn... Enteriga procesio renkontiĝis al mi; aŭdiĝas pafado de bastionoj.

Mi eniris restoracion por aŭskulti paroladojn de ŝipanoj kaj oficiroj; certe, tie jam oni rakontas pri pasinta nokto, pri batalo je la 24-a, pri tio, kiel multekosta kaj malbona estas nutraĵo, kaj pri tio, kiel estis mortigita tiu aŭ alia kamarado sur kvara bastiono (ĝi estis plej danĝera loko en Sebastopolo).

Kaj mi volis iri plej baldaŭ sur bastionojn, nome sur la kvaran, pri kiu oni rakontadis tiel multe. Mi eliris el la restoracio, supreniĝis surmonten laŭ granda strato. Domoj ambaŭflanke de la strato estas ruinigitaj, elpendaĵoj malestas, pordoj estas fermitaj per tabuloj, fenestroj estas disbatitaj, ie angulo de muro estas forbatita per kuglego, ie tegmento estas trabatita. Voje mi fale-
tas je kuglegoj, senorde kuŝantaj, kaj falas kavojn plenajn je akvo kaj elfositajn en ŝtona grundo per bomboj. Sur la strato mi renkontas kaj antaŭiĝas solda-

tojn, oficirojn; iafoge renkontiĝas virino aŭ infano, sed virino—jam ne kun ĉapelo, sed ŝipanedzino—en malnova pelteto kaj en soldatoj botoj. Pasante pluen laŭ la strato kaj malsupreniĝinte desurmonte, mi rimarkas ĉirkaŭ mi jam ne domojn, sed iajn strangajn ruinaĵojn el ŝtonoj, tabuloj, argilo, traboj; antaŭ mi, sur kruta monto, mi vidas ian nigran kotan lokon, elfositan je kavkanaloj, kaj ĝi estas la kvara bastiono... Tie ĉi ankoraŭ malpli da homoj renkontiĝas al mi; virinoj tute ne estas vidataj, soldatoj iras rapide, gutoj de sango renkontiĝas sur vojo, kaj nepre renkontiĝadas ĉi-tie kvar soldatoj kun portilo kaj sur la portilo—palflava vizaĝo kaj sangokovrita soldata mantelo. Se mi demandus: „Kien li estas vundita?“—la portistoj dirus kolere kaj ne turnante sin al mi: „Piedon aŭ brakon“, se li estas facile vundita; aŭ ili silentus malafable, se vizaĝo estas kovrita kaj li jam mortis aŭ estas malfacile vundita.

Nemalproksima fajfo de kuglego aŭ bombo, kiam mi komencis iri surmonten, malagrabla konsternis min.

Apenaŭ mi iomete supreniĝis surmonten, kugloj komencas fajfi dekstre kaj maldekstre de mi, kaj mi eĉ ekmeditis, ĉu ne estas pli bone iri laŭ tranŝeo (kavkanalo, elfosata por pasi pli sendanĝere al baterioj); sed la tranŝeo estis plenigita per tia fluida flava malbonodora koto, pli supre ol ĝis genuo, ke mi elektis vojon sur monto, des pli ke, kiel mi vidas, ĉiuj iras laŭ la vojo. Pasinte ducent paŝojn, mi eliris sur kotan lokon, ĉirkaŭitan de ĉiuj flankoj per teramasajo; kun pulvaj keloj, terloĝejoj; kaj sur la teramasajoj staras grandaj

ferfandajaj paflegoj kaj kuglegoj. Ĉio tio ĉi ŝajnis al mi dismetita sen ia ordo: ie amaseto da ŝipanoj sidas sur baterio; ie meze de placo kuŝas disbatita paflego, duone droninta en koto; ie infanteria soldato kun pafilo transiras baterion kaj kun malfacileco eltiradas piedojn el glua koto. Ĉie, ĉiufanke, en fluida glua koto, kuŝas ne eksplodintaj bomboj, kuglegoj; aŭdiĝas fajfado de kugloj kaj terura fajfego de pafado.

„Jen kia ĝi estas, kvara bastiono, jen ĝi—tiu ĉi timiga, efektive terura loko!“ mi pensis. Sed ĝi ne ankoraŭ estis kvara bastiono. Ĝi estas Jazona reduto,—loko, kompare tre sendanĝera kaj tute ne terura. Por iri kvaran bastionon, necesas sin direkti dekstren laŭ tiu ĉi mallarĝa tranŝeo, laŭ kiu infanteria soldato ekiris, sin klininte. En tiu ĉi tranŝeo mi renkontis denove portilon, ŝipanon, soldatojn kun fosiloj, kotajn terloĝejoj, kien nur du homoj povas enrampi, sin fleksinte; mi ekvidis denove ĉie la saman malbonodoran koton kaj diversajn disrompaĵojn de ferfandaĵo. Pasinte ankoraŭ tricent paŝojn, mi eliris sur baterion—sur placeton, elfositan je kavoj, kun paflegoj kaj kun teraj remparoj. Tie ĉi mi ekvidis kvin ŝipanojn, ludantajn je karto sub „brustvero“ (teramasajo por defendo kontraŭ malamikaj pafoj), kaj ŝipoficiron, kiu, rimarkinte min kiel scivoleman homon, kun plezuro montris al mi sian mastrajon kaj ĉion, kio povas esti interesa por mi. Tiu ĉi oficiro tiel trankvile faris cigaredon, sidante sur paflego, tiel trankvile parolis kun mi, ke malgraŭ kugloj, kiuj pli ofte ol antaŭe fajfis super mi, mi fariĝis pli trankvila,

atente demandis kaj aŭskultis rakontojn de la oficiro. Elstariĝante el-post „ambrazuro“ (aperturo de paflego), por rigardi malamikojn, mi ekvidis nenion kaj mi tre miris, kiam mi sciigis, ke tiu ĉi blanka ŝtona remparo, kiu estas tiel proksime de mi kaj sur kiu iafoje ekaperas blankaj fumetoj—tiu ĉi blanka remparo estas nome malamiko—„li“, kiel diras soldatoj kaj ŝipanoj.

La oficiro ekvolis iom pafi en mia ĉeesto.

— Oni sendu bateriestron kaj servantojn al paflego!

Kaj dekkvar ŝipanoj, lerte, ĝoje, iu enŝovante en poŝon pipon, iu finante maĉi sekigintan panon, frapante je platformo per botoj, aliris al paflego kaj ŝargis ĝin.

Subite aŭdiĝis terurega fajfego de pafilo: mi ektemis per tuta korpo. Tuj poste aŭdiĝis fajfo de malproksimiĝanta kuglego—kaj densa pulva fumo kovris min kaj moviĝantajn ŝipanojn. Okaze de tiu ĉi pafilo komencis diversaj paroloj de ŝipanoj.

— Oni trafis ambrazuron mem.

— Jen „li“ ekkoleris—tuj ekpafos tien ĉi,—diris iu el ili, kaj efektive baldaŭ post tio ĉi fajro kaj fumo montriĝis antaŭe; deĵoranto ekkriis.

— Pafilo—ego! kaj tuj post tio ĉi kuglego ekfajfis preter ni, ekbatigis je tero kaj disĵetis funele ĉirkaŭ si sprucojn kaj ŝtonojn.

Bateria komandanto ekkoleris je tiu ĉi kuglego, ordonis ŝargi duan kaj trian pafilegojn; malamiko ankaŭ komencis respondi al ni.

Deĵoranto denove ekkriis: „Paflego!“—kaj aŭdiĝis la sama ekbato, eksutigis la samaj sprucoj. „Markelo!“

(bombarda paflego)—aŭdiĝis denove, kaj denove fajfado de bombo, ĉiam pli proksime; nigra globo ekbatigis je tero, poste disrompaĵoj disflugas kun fajfo, ŝtonoj ekbruas en aero, kaj ĉiuj sprucmakuliĝas per koto. Jen ankoraŭ deĵoranto ekkriis: „Markelo!“—ankoraŭ fajfado, ekbato, eksplodo de bombo, sed kune kun tio ĉi mi ekaŭdis ĝemon de homo. Mi aliris al vundito, kiu estas tuta en sango kaj en koto. La parto de la brusto estis forŝirita ĉe ŝipano. Oni levas lin, li haltigas portilon kaj kun malfacileco, per tremanta voĉo, diras al kamaradoj:

— Pardonu, fratoj!

La saman tempon kamarado—ŝipano aliras al li, surmetas ĉapon sur la kapon, kiun la vundito substarigas al li, kaj revenas al sia paflego.

— Ĉiun tagon estas tiel—sep aŭ ok homoj,— diras la oficiro al mi.

Mi revenis urbon.

Laŭ maro disportigis sonoj de regimenta orkestro sur bulvardo, kaj kune tie ĉi aŭdiĝas pafiloj el bastionoj.

SEBASTOPOLO EN MAJO DE 1855 JARO.

I.

En sieĝita urbo Sebastopolo regimenta orkestro ludis sur bulvardo, kaj amasoj de militista popolo kaj de virinoj, feste vestitaj, moviĝis sur vojetoj.

Altkreska, iom kvazaŭgiba infanteria oficiro Miĥajlov

eliris el pordeto de unu el malgrandaj ŝipanj dometoj kaj, mediteme rigardante teren, ekiris surmonten al la bulvardo. Sur li estis malmulte eluzita ĉapo, maldika iom stranga violkolora mantelo, el-sub kiu vidiĝis ora horloĝa ĉeno, pantolonoj kun stripoj kaj puraj brilantaj botoj el bovida led.

Li aliris komence al la loko, kie staris muzikistoj, ĉirkaŭ kiuj skribistoj, junkroj, vartistinoj kun infanoj faris grupon, pli rigardante, ol aŭskultante. Ĉirkaŭe staris, sidis kaj promenis pleje ŝipanoj kaj oficiroj en blankaj gantoj. Poste li aliris al grupo de oficiroj. Tiu ĉi grupo konsistis el kvar oficiroj: adjutanto Kalugin, konatulo de Miĥajlov, adjutanto princo Galcin, regimentestro Neferdov kaj kavaleria kapitano Praskuĥin.

— Nu, kapitano,—diris Kalugin,—kiam ni estos de-nove sur bastiono? Ĉu vi memoras, kiel ni renkontiĝis sur Ŝvarca reduto,—ĉu efektive estis varmege? He?

— Jes, varmege,—diris Miĥajlov; kaj li rememoris, kiel li tiun nokton iris singardeme laŭ tranŝeo sur bastionon kaj renkontis Kalugin'on, kiu iris tia bravulo, vigle tinte per sabro.

— Mi devus iri morgaŭ; sed,—daŭrigis Miĥajlov—unu oficiro estas malsana ĉe ni, pro tio...

Li volis rakonti, ke vico estis ne lia, sed ĉar komandanto de la oka roto estis malsana, kaj en la roto restis nur signojunkro, li volis ekiri bastionon por anstataŭi leŭtenanton.

— Kaj mi sentas, ke io okazos dum proksimaj tagoj,—diris Kalugin al la princo Galcin.

— Ĉu ne okazos io eĉ hodiaŭ?—timeme demandis Miĥajlov, rigardante jen Kalugin'on, jen Galcin'on.

Neniu respondis al li.

II.

Sed apenaŭ Miĥajlov transpaŝis sojlon de sia loĝejo, kiel tute aliaj pensoj venis al li en la kapon. Li ekvidis sian malgrandan ĉambron kun tera neglata planko kaj kun kurbaj fenestroj, fermitaj per algluita papero, sian malnovan malpuran liton kun katuna litkovrilo, liton de junkro, kiu loĝis kun li; li ekvidis sian Nikiton, kiu, kun hirtaj sebaĵ haroj, sin gratetante, sin levis de la planko; li ekvidis sian malnovan mantelon, botojn kaj kunligaĵon, el kiu elŝoviĝis ekstremaĵo de fromaĝo kaj gorĝeto de botelo kun brando; la kunligaĵo estas preparita por li por preni ĝin sur bastionon,—kaj subite li rememoris, ke hodiaŭ li devas ekiri por tuta nokto kun roto en „loĝementojn“ (kavkanalo antaŭ remparo).

„Certe, mi estos mortigita hodiaŭ,—pensis Miĥajlov,—mi sentas ĝin. Por kio mi mem proponis min por iri! Nepre oni mortigos min. Nu, kion fari! ja iu devas iri; se ne mi, iu alia; ja tuta roto ne povas iri kun sola oficiro“. Li sidiĝis al tablo kaj komencis skribi adiaŭan leteron al sia patro. Post dek minutoj li finis la leteron, sin levis de la tablo kun la okuloj, malsekaj pro larmoj, kaj komencis sin vesti. Ebrieta kaj malde-likata servanto donis al li novan surtuton (malnova, kiun Miĥajlov ĉiam vestis, ekirante bastionon, ne estis riparita).

— Pro kio la surtuto ne estas riparita? Vi nur dormas!..—kolere diris Miĥajlov.

— Por kio dormi?—murmuris Nikito.—Tutan tagon mi kuras, kiel hundo, laciĝas, kaj jen—ne dormu!

— Vi denove estas ebria, mi vidas!

— Mi ebriiĝis ne por via mono,—pro kio vi riproĉas?

— Silentu, malsaĝulo,—ekkriis Miĥajlov. Lin ĉagrenis la maldelikateco de Nikito, kiun li amis, eĉ dorlotis kaj kun kiu li vivis jam dekdu jarojn.

— Malsaĝulo! malsaĝulo! —ripetis la servisto:—kaj pro kio vi insultas min malsaĝulo, sinjoro? Ja nun estas kia tempo,—nebone estas insulti.

Miĥajlov rememoris, kien li iras, kaj ekhontis.

— Ja vi igos iun ajn perdi paciencon... Nikito,—li diris per kvieta voĉo,—restigu tiun ĉi leteron al la patro sur la tablo kaj ne tuŝu ĝin,—aldiris li, ruĝiĝante.

— Bone,—diris Nikito.

Li ekkompatis sian sinjoron. Li palpebrumis kaj estis preta ekplori.

Sed kiam Miĥajlov diris sur perono: „adiaŭ, Nikito!“—Nikito subite ekploregis kaj sin ĵetis kisi la sinjoron. „Adiaŭ, sinjoro!“ li diris ekploretante. Maljunulino-ŝipanedzino, kiu staris sur la perono, komencis viŝi okulojn per kota maniko kaj diri ion pri tio, ke eĉ sinjoroj prenas sur sin tiajn suferojn, kaj rakontis centan fojon al ebria Nikito pri sia malfeliĉo: kiel lia edzo estis mortigita dum unua bombardado kaj kiel ŝia dometo

estis tuta ruinigita (tiu, en kiu ŝi loĝis, ne apartenis al ŝi) k. t. p.

„Sed, eble, oni nur vundos min,—meditis Miĥajlov, jam vespere alirante kun roto al la bastiono.—Sed kien, kiel?.. En ventron aŭ en bruston? Jen se ĉi tien (li penis pri supra parto de piedo) kaj se ĝi trairus ĉirkaŭe... Nu, se ĉi tien—per disrompaĵo—estas finite!“

Miĥajlov bonstate ĝisiris laŭ tranŝeoj ĝis loĝementoj, disstarigis jam en tuta mallumo homojn por laboro kaj sidiĝis en kaveton sub „brustvero“; pafado estis malgranda,—nur malofte fajroj ekflametis jen ĉe ni, jen ĉe „li“, kaj lumanta bombo traflugis sur malluma stela ĉielo. Sed ĉiuj bomboj falis malproksime antaŭe aŭ dekstre de loĝmento, en kiu Miĥajlov sidis en kaveto. Li trinkis brandon, manĝis fromaĝon, fumis cigaredon kaj, preĝinte al Dio, volis iom dormi.

III.

Soldatoj portis vunditojn sur portiloj kaj kondukis ilin subbrake. Sur strato estis tute mallume; nur malofte ie estis lumo, en fenestroj de malsanulejo aŭ ĉe iaj oficiroj. De la bastiono aŭdiĝis la sama rompobruo de paflegoj kaj de pafila interpafado, kaj la samaj fajroj ekflametis sur nigra ĉielo. Malofte aŭdiĝis piedfrapado de ĉevalo de rajdanta soldato, ĝemo de vundito, paŝoj kaj parolado de portistoj aŭ parolado de timigitaj loĝantinoj, elirintaj sur peronon por rigardi pafadon.

Konata de ni Nikito, maljuna ŝipanvidvino kaj ŝia dekjara filino ankaŭ staris sur perono kaj interparolis.

— Dio!—diris ekspirante la maljunulino, rigardante bombojn, kiuj kiel fajraj pilkoj, senĉese transflugis de unu flanko al alia.—Teruro, teruro! Tiel eĉ ne estis dum unua bombardado. Jen kie ĝi eksplodis, malbenita,—rekte sub nia dometo en antaŭurbo!

— Ne, pli malproksime,—ili falas ĉiam al onklino Ireno en ĝardenon,—diris la knabineto.

— Kaj kie estas nun mia sinjoro? diris Nikito, ankoraŭ iom ebria.—He, kiel mi amas mian sinjoron, nu jen mi mem ne scias,—mi tiel amas, ke se, Dio evitigu, oni lin mortigos, tiam, ĉu vi kredas, onklino, post tio ĉi mi mem ne scias, kion mi povas fari al mi,—je Dio. Li estas ja tia sinjoro, ke!.. Ja ne eble estas lin kompari kun tiuj, kiuj tie ĉi ludas je karto! Tiuj ĉi—fi! konkludis Nikito.

— Steletoj, steletoj ruliĝas! diris la knabineto, rigardante ĉielon.—Jen, jen ankoraŭ unu ruliĝis! Por kio ĝi estas, panjo?

— Oni tute disrompos nian dometon! diris la maljunulino, ekspirante kaj ne respondante al la demando de la knabino.

— Kiam mi kun onklo iris tien, panjo,—daŭrigis la knabino per kanta voĉo,—mi vidis, grandega tia kuglego kuŝas en la ĉambro mem apud ŝranko: videble, ĝi trabatis vestiblon kaj enflugis ĉambron... Tia grandega, ke ne eble estas levi!

— Kiuj havis edzojn kaj monon, tiuj forloĝiĝis,—di-

ris la maljunulino, — kaj ĉe mi—lasta dometo, kaj oni disbatis ĝin. Jen, jen kiel „li“, malbonulo, pafas. Sinjoro! Sinjoro!

— Kaj kiam ni volis jam eliri, unu bombo alflugis, eksplodis, supersutis per tero, eĉ preskaŭ trafis nin kun onklo per unu disrampaĵo,—daŭrigis la knabino rakonti.

IV.

Princo Galcin ekiris de la bulvardo al Kalugin. Dum ili sidis kaj trinkis teon, oficiro kun kazako alrajdis al ili, al fenestro... Kalugin aliris al la fenestro kaj demandis:

— De kie?

— De la bastiono, mi bezonas vidi generalon,—kaj la oficiro komencis malsupreniĝi de la ĉevalo.

— Ni iru, mi akompanos vin.

Post kvin minutoj Kalugin jam rajdis la bastionon kun ordonoj de la generalo.

Galcin restis sola; li aliris al la fenestro. Bomboj tre ofte transflugadis sur malluma ĉielo; aŭdiĝis pafadoj, kaj de malproksime ekaŭdiĝis daŭranta „hurà“. Ne sidigis al Galcin en la ĉambro, kaj li eliris sur la straton.

Sur vojo ĉiam pli da vunditoj renkontiĝadis al li: unujn oni portis sur portiloj, aliaj iris, helpante iri unu al alia, kaj interparolis laŭtvoĉe.

— Kiel ili alsaltis, miaj fratoj,—diras base unu alta soldato, portanta du pafilojn sur ŝultroj,—kiel ili alsal-

tis, kiel ili ekkriis- „alla, alla!“—tiel ili surrampas unu super alian.

— Ĉu vi estas de la bastiono?—demandis Galcin.

— Ĝuste tiel, via moŝto!

— Nu, kio estis tie? Rakontu.

— Kio estis? Aliris multego da „ili“, via moŝto! ili surrampas sur remparon—nu jen. Ili tute superfortis, via moŝto!

— Kiel superfortis? Ja vi rebatis ilin!

— Nu, kiel rebati, se tuta „lia“ forto aliris! Li mortigis nin ĉiujn, kaj oni ne donas al ni helpon.

La soldato eraris, ĉar la tranŝeo restis nia. Sed ĝi okazas tiel ĉiam; soldato, vundita en batalo, ĉiam opinias ĝin malgajnita kaj terure sangversa.

— Kiel oni diris al mi, ke oni rebatis? kun ĉagreno diris Galcin.—Eble, oni rebatis post vi? Ĉu vi estas de tie jam antaŭdelonge?

— Tuj, via moŝto! respondis la soldato.

— Nu, malcerte; verŝajne la tranŝeo restis nia... Tute superfortis!

Galcin ĉagreniĝis kaj diris:

— Nu, kiel vi ne hontas! vi fordonis la tranŝeon... Estas terure!

— Kion fari, se ili havis tian forton?—murmuris la soldato.

— Kaj, via moŝto, alia soldato ekparolis de portilo tiun tempon, kiam la portilo estis tute apud Galcin,—kiel ne fordoni, se „li“ mortigis nin preskaŭ ĉiujn. Se ni havus forton, ni fordonus nenioakaze. Sed kion fari?

Ho, pli gardeme, fratoj, iru pli egalmezure, pli egalmezure! Ho, ho! ekĝemis la vundito.

— Efektive, ŝajnas, multo da homoj iras tute senbezzone,—diris Galcin, haltigante denove la saman altkreskan soldaton kun du pafiloj.—Por kio vi iras? He vi, haltu!

La soldato haltis kaj demetis la ĉapon per la maldekstra mano.

— Kien vi iras kaj por kio? ekkriis li severe.

Sed tiun ĉi tempon li aliris pli proksime al la soldato kaj rimarkis, ke lia dekstra brako estis en sango pli supre ol kubuto.

— Mi estas vundita, via moŝto!

— Per kio vi estas vundita?

— Tien ĉi, ŝajnas, per kuglo,—diris la soldato, montrante sur la brakon,—kaj mi ne povas scii, per kio oni trabatis la kapon,—kaj li inklinis ĝin kaj montris sangokovritajn kungluiĝintajn harojn sur la nuko.

— Kaj kies estas la pafilo?

— Franca, via moŝto,—mi forprenis. Kaj mi ne ekirus, se ne estus necese akompani tiun ĉi soldaton, li ja povas fali,—li aldiris kaj montris sur la soldaton, kiu iris iom antaŭe, sin apogante je pafilo kaj kun malfacileco transmovante la maldekstran piedon.

Princo Galcin subite tre ekhontis pro siaj vanaj atakaĉoj. Li eksentis, ke li ruĝiĝas, sin deturnis kaj jam plu ne demandadis vunditojn kaj ne rigardis ilin, sed ekiris tien, kie oni bandagiĝas vunditojn.

Kun malfacileco transpuŝiginte sur perono inter pied-

irantaj vunditoj kaj inter portistoj, enirantaj kun vunditoj kaj elirantaj kun mortintoj, Galein eniris unuan ĉambron, ekrigardis kaj tuj nevole returnis sin kaj elkuris sur la straton: tio, kion li ekvidis, estis terurega!

V.

Granda alta malluma ĉambro estis plena je vunditoj. Kuracistoj kun kandeloj en manoj iradis kaj esploradis vunditojn. Portistoj senĉese enportis vunditojn, metis ilin unu apud alia sur la planko kaj ekiradis por novaj vunditoj. Sur la planko estis jam tiel malvaste, ke malfeliĉuloj amasis kaj malsekiĝis unu en sango de alia. Pro febra spirado de kelkaj centoj da homoj, pro ŝvito de laboristoj kun portiloj tie ĉi estis tia densa, malbonodora nebulo, ke eĉ kandeloj brulis malhele. Obtuzo de diversaj ĝemoj, de ekspiroj, de stertoro, iafoje de krioj portiĝis en tuta ĉambro. Flegistinoj kun trankvilaj vizaĝoj paŝadis trans vunditoj por medikamentoj, por akvo, por bandaĝoj, aperadis kaj malaperadis inter sangokovritaj manteloj kaj ĉemizoj. Kuracistoj kun elturnitaj manikoj staris sur genuoj apud vunditoj, esploris kaj palpis vundojn, malgraŭ teruraj ĝemoj kaj petegoj de suferantoj. Unu el kuracistoj sidis apud pordo, apud tablo kaj tiun minuton, kiam Galein eniris ĉambron, enskribis jam 532-an vunditon.

— Ivàn Bogaev, soldato de tria roto de Selengina regimento!.. ostrompo de femuro,—kriis alia kuracisto, palpante disbatitan piedon.—Transturnu lin.

— Ho, ho, miaj patroj, vi, niaj patroj!—kriis la soldato, petegante, ke oni lin ne tuŝu.

— Trarompo de kapo!

— Simeono Neferdov, subkolonelo de Minska infanteria regimento!.. Vi estu iomete pacienca, alie estas ne eble: mi devos ĉesi,—diras tria kuracisto, esplorante per ia hoketo en la kapo de la malfeliĉa subkolonelo.

— Ha, malnecesas! Ho, pro Dio, pli baldaŭ, pli baldaŭ, pro... Ha-a-a!

— Trabato de brusto! Sebastiano Seredà, soldato... de kiu regimento? Cetere, ne skribu,—li mortas. Portu lin,—diris la kuracisto, deirante de la soldato, kiu, suprenrulinte okulojn, jam stertoris.

Kvardek soldatoj-portistoj, atendante por porti bandaĝitajn en malsanulejon kaj mortintajn en kapelon, staris apud la pordo kaj silente, de tempo al tempo ekspiregante, rigardis ĉion tion ĉi...

VI.

Sur la vojo al la bastiono la oficiro Kalugin renkontis multajn vunditojn; sed, sciante, laŭ sperto, kiel malbone tiuj ĉi scenoj efikas spiriton de homo, li ne nur ne haltis por demandi ilin, sed male penis meti sur ilin nenian atenton. Sub monto renkontiĝis al li oficiro, kiu galopis de la bastiono.

— Zobkin! Zobkin! haltu por unu minuto.

— Nu, kion?

— De kie vi estas?

— El loĝementoj.

— Nu, ĉu tie estas varmege?

— Ha, terure!

Kaj la oficiro ekgalopis pluen.

Efektive, kvankam pafila pafado estis malmulta, kanonado (pafilega pafado) pligrandiĝis kun nova varmegeco kaj krueleco.

„Ha, malbonege!“—pensis Kalugin. Al li fariĝis malagrabla, kaj li rememoris pri morto. Li alrajdis al tiu loko, kie li devis malsupreniĝi de ĉevalo. Tie ĉi li ekvidis kvar soldatojn, kiuj sidis kaj fumis pipojn.

— Kion vi faras tie ĉi? li ekkriis.

— Ni forkondukis vunditon, via mosto, kaj ekvolis ripozi,—respondis unu el ili, kaŝante la pipon post la dorson kaj demetante la ĉapon.

— He... ripozi... Nu, iru al viaj pozicioj!

Kaj li kune kun ili ekiris laŭ tranŝeo surmonten, renkontante ĉiupaŝe vunditojn. Supreniĝinte sur monton, li turnis sin maldekstren, kaj pasinte sur ĝi kelkajn paŝojn, li montriĝis tute sola. Tute proksime de li disrompaĵo trafajfis kaj ekbatigis je tranŝeo. Alia bombo leviĝis super li kaj, ŝajnis, flugis rekte sur lin. Subite al li fariĝis terure: li trakuris kvin paŝojn kaj kuŝiĝis teren. Kiam la bombo eksplodis malproksime de li, li tre ĉagreniĝis je si mem kaj sin levis, ekrigardante reen, ĉu iu ne vidis, kiel li kuŝis; sed neniuj estis.

Se homo cedis al timo nur unu fojon, tiam timo malaperas jam nebaldaŭ. Kalugin, kiu ĉiam fanfaronis, ke li neniam klinas sin antaŭ kugloj, nun li kurante kaj preskaŭ rampante ekiris laŭ tranŝeo. „Ha, nebone!—li pen-

sis, faletinte:—nepre oni mortigos min!“ Li sentis, kio malfacile li spiras kaj kiel ŝvito aperas sur tuta korpo, kaj li miris je si mem.

Subite ies paŝoj aŭdiĝis antaŭ li. Li rapide rektiĝis, levis la kapon kaj vigle tintante per sabro ekiris jam ne per tiaj rapidaj paŝoj, kiel antaŭe. Li ne ekkonis sin. Kiam li kunvenis kun renkontiĝinta al li ŝipoficiro kaj li unua ekkriis al li: „kuŝiĝu!“—montrante sur luman bombon, kiu ĉiam pli luma, ĉiam pli rapide alproksimiĝanta, ekbatigis apud tranŝeo,—Kalugin nur iom klinis la kapon kaj ekiris pluen.

— Jen, kia brava li estas,—eĉ ne volas kuŝiĝi!—diris la ŝipano, kiu mem trankvile rigardis falantan bombon kaj tuj elkalkulis per sperta okulo, ke ĝiaj disrompaĵoj ne povas trafi en tranŝeo.

Jam nur kelkaj paŝoj restis al Kalugin por trairi placeton ĝis blindago *) de komandanto de bastiono, kiam tiu ĉi malsaĝa timo denove atakis lin; la koro ekbatis pli rapide, sango alfluis al la kapo, kaj li apenaŭ povis ĝiskuri ĝis la blindago.

— Pro kio vi spiras tiel malfacile?—diris la generalo, kiam Kalugin transdonis al li ordonojn.

— Mi iris tre rapide, via mosto.

— Ĉu vi deziras glason da vino?

Kalugin eltrinkis glason da vino kaj ekfumis cigare-

*) Loĝejo, kies tegmento konstruiĝas tiel: oni sursternas grandegajn trabojn kaj sur ili oni surŝutas dikan tavolon de tero, por ke bombo ne povu trabori tiun ĉi tegmenton.

don. La batalo jam ĉesis; nur forta kanonado daŭris de ambaŭ flankoj. En blindago sidis—la generalo Panfilov, la komandanto de bastiono Praskuhin kaj ankoraŭ ses oficiroj, kaj parolis pri diversaj detaloj de la batalo. Kalugin sidis en tiu ĉi komforta ĉambro kun kanapo, kun lito, kun tablo, sur kiu kuŝis paperoj, kun muraj horloĝoj kaj kun sanktobildo, antaŭ kiu brulis lampiono, kaj rigardis dikajn trabojn de plafono, aŭskultante pafojn, kiuj ŝajnis malfortaj en blindago,—li tute ne povis kompreni, kiel li povis tiel ektimi du fojojn. Li koleris je si kaj volis danĝeron por ke provi sin denove.

Tiun ĉi tempon ŝipoficiro eniris la blindagon kaj komencis peti la generalon doni al li laboristojn, por ripari sur lia baterio du ambrazurojn, kiuj estis supersutitaj. Kiam li ĉesis paroli kun la generalo, Kalugin diris al li:

— He, mi estas ĝoja, ke vi estas tie ĉi, kapitano: la generalo ordonis al mi sciigi, ĉu niaj pafalegoj povas pafi per kartoĉoj?

— Sola pafalego povas,—malafable respondis la kapitano.

— Tamen ni iru, rigardu.

Kapitano sulkigis frunton kaj kolere diris:

— Mi tie staris jam tutan nokton, mi venis por ripoziom; ĉu vi povas ekiri sola? Tie nia helpanto montros al li ĉion.

Jam ses monatojn la kapitano komandis tiun ĉi baterion, unu el la plej danĝeraj, kaj eĉ kiam blindagoj ankoraŭ ne estis, li estis sur bastiono, ne forlasante ĝin

de la komenco de la sieĝo, kaj estis nomata de ŝipanoj kuraĝulo. Pro tio lia respondo tre miris Kalugin'on. Tiu ĉi kapitano estis sur la bastiono jam ses monatojn kaj alkutimiĝis ne sin ŝovi en danĝeron senbezone, kaj Kalugin estis ankoraŭ novulo en tiu ĉi afero,—la danĝero plaĉis al li, kaj pro tio li ekopiniis la kapitanon malkuraĝulo kaj mokeme diris al li:

— Nu, tiaokaze mi ekiros sola, se vi permesos.

Esplorinte la baterion kaj sin direktante reen al la blindago, Kalugin surpuŝiĝis en mallumo sur la generalon, kiu iris kun siaj subuloj sur la supron.

— Kapitano Praskuhin! — diris la generalo:—iru, mi petas, dekstran loĝementon kaj diru al dua bataliono de Minska regimento, kiu laboras tie, ke li ĉesu labori, senbrue eliru de tie kaj aliĝu al sia regimento, kiu staras sub la monto en rezervo... Ĉu vi komprenas? vi mem alkonduku la batalionon al la regimento.

— Bone!

Kaj Praskuhin ekkuris al la loĝemento.

La pafado fariĝis ĉiam pli malofla.

VII.

Ĉu ĝi estas la dua bataliono de la Minska regimento?—demandis Praskuhin, alkurinte al la loko kaj surpuŝiĝinte sur soldatojn, kiuj portis teron en sako.

— Ĝuste tiel.

— Kie estas la komandanto?

Miĥajlov opiniis, ke oni demandas pri rota koman-

danto; li eliĝis el sia kaveto kaj, opiniante Praskuĥin'on estro, tenante manon apud ĉapsirmeto, aliris al li.

— La generalo ordonis... al vi... iru... sed pli rapide... kaj ĉefe, pli mallaŭte antaŭen... ne antaŭen, sed al la rezervo, — diris Praskuĥin, ekrigardante flanken sur fajretoj de malamiko.

Miĥajlov, ekkoninte Praskuĥin'on, mallevis la manon, komprenis la aferon kaj transdonis ordonon. La bataliono ekmovetiĝis, prenis pafilojn, surmetis mantelojn kaj ekiris.

Kiu ne estis mem sur bastiono, tiu eĉ ne povas imagi, kiel homo ĝojas, kiam prosperis al li foriri de tiu ĉi danĝera loko. Miĥajlov, dum li sidis tie ĉi, jam multajn fojojn pensis pri tio, ke oni mortigos lin nepre, kaj eĉ al kutimiĝis al tiu ĉi penso. Sed kiam li iris antaŭ sia roto kune kun Praskuĥin, li apenaŭ povis deteni siajn piedojn, por ke ili ne kuru.

— Ĝis revido, — diris al li majoro, komandanto de alia bataliono; la majoro restis tie-ĉi kaj kune kun Miĥajlov manĝis fromaĝon, sidante en kaveto apud la bastiono.

— Ankaŭ al vi mi deziras feliĉe rebati. Nun, ŝajnas, silentiĝis.

Apenaŭ li diris tion-ĉi, kiel malamiko, verŝajne, rimarkinte movadon en bastiono, komencis pafi pli ofte. Niaj komencis respondi al li, kaj denove ekiĝis forta kano-nado. Nokto estis malluma; nur fajretoj de pafoj kaj de eksplodo de bomboj iatemp lumigis vojon, kie iris soldatoj. La soldatoj iris rapide, silente kaj nevole antaŭiĝis unuj aliajn; aŭdiĝis egalmezuraj sonoj de iliaj paŝoj

sur seka vojo, sonoj de kunpuŝiĝintaj bajonetoj aŭ ekspiro kaj preĝo de iu soldato: „Sinjoro, Sinjoro! kio ĝi estas?“ Iloje aŭdiĝis ĝemo de vundito kaj krioj: „Portilon!“ (En roto, kiun Miĥajlov komandis, 36 homoj estis mortigitaj dum nokto). Malproksime ekflamadis fulmo, deĵoranto el bataliono kriis: „Pafle-ego!“ kaj kuglegoj, fajfante super la roto, faladis teren, eksplodadis kaj suprenĵetadis ŝtonojn.

„Diablo prenu! kiel malrapide ili iras, — pensis Praskuĥin, ekrigardante reen kaj paŝante apud Miĥajlov. — Vere, estas pli bone, se mi kuros antaŭen: ja, mi transdonis ordonon... Cetere, ne, oni ja povas rakonti poste, ke mi estas malkuraĝulo. Kio ajn okazos, tio okazos — mi ekiros kune“.

„Kaj pro kio li iras post mi, — pensis Miĥajlov sia-vice: — kiel mi rimarkis, li ĉiam alportas malfeliĉon... Jen ĝi flugas rekte ĉi tien, ŝajnas“...

Pasinte kelkajn centojn da paŝoj, ili kunpuŝiĝis kun Kalugin, kiu, vigle tintante per sabro, iris al la bastionoj, por sciigi, laŭ ordono de la generalo, kiel laboroj fariĝas tie. Renkontinte Miĥajlov'on, li ekpensis, ke, anstataŭ iri mem tien sub tiu ĉi terura pafado, kio ja ne estis ordonita al li, li povas demandi detale oficiron, kiu estis tie. Kaj efektive Miĥajlov detale rakontis al li pri laboroj. Pasinte ankoraŭ iom kun li, Kalugin ekiris reen en tranŝeon, kondukantan al la blindiĝo.

— Nu, kio estas nova? — demandis oficiro, kiu sola sidis en ĉambro kaj vespermanĝis.

— Nenio; ŝajnas, ke batalo ne estas plu.

— Kiel ne estas? Male, la generalo tuj denove eliris sur supron. Ankoraŭ unu regimento venis. Jen ĝi estas... ĉu vi aŭdas? Pafila pafado denove komenciĝis. Vi ne iru. Por kio?—aldiris la oficiro, rimarkinte, ke Kalugin volas iri.

„Laŭvere, mi nepre devas esti tie,—pensis Kalugin,—nu, ja mi estis hodiaŭ multe en danĝero,—terura pafado“.

„Certe, estas pli bone, sed mi atendos ilin tie ĉi,—li diris.

Efektive post dudek minutoj la generalo revenis kune kun oficiroj kaj kun junkro Pest. Loĝementoj estis reprenitaj kaj okupitaj de ni.

Demandinte detale pri la afero, Kalugin, kune kun Pest, eliris el la blindago.

— Via mantelo estas en sango: ĉu vi manbatalis?—lin demandis Kalugin.

— Ha, terure! Se vi povas imagi...

Kaj Pest komencis rakonti.

La bataliono, al kiu la junkro estis alkomandita por atako de malamikoj, staris du horojn sub pafado apud ia muro; poste bataliona komandanto diris ion, rotaj komandantoj ekmovetiĝis, la bataliono ekiris, pasis cent paŝojn, haltis, stariĝinte je rotaj kolonoj. Oni diris al Pest, ke li stariĝu sur dekstra flanko de la dua roto.

La junkro stariĝis sur la lokon kaj komencis kun timo rigardi antaŭen, en malluman malproksimon, atendante ion teruran. Denove la bataliona komandanto di-

ris ion. Denove oficiroj murmurete ekparolis, transdonante ordonojn; kaj la unua roto subite sin mallevis,—estis ordonite kuŝiĝi. La dua roto kuŝiĝis ankaŭ, kaj Pest, kuŝiĝante, pikis la manon je ia pikilo. Sola komandanto de la dua roto ne kuŝiĝis. Li staris antaŭ la roto kaj svingis la spadon.

Tiun ĉi tempon antaŭ la roto mem subite ekflamis flamo, aŭdiĝis krakado, surdiginta tutan roton, ekbruis ŝtonoj kaj disrompaĵoj alte en aero, kaj unu ŝtono falis desupre kaj ekbatigis je piedo de soldato. Ĝi estis bombo, kaj tio, ke ĝi trafis la roton, montris, ke francoj ekrimarkis la roton.

Tuj post tio ĉi la unua roto sin levis, poste—la dua. Estis ordonite mallevi pafilojn, kaj la bataliono ekiris antaŭen. Pest tiel timis, ke li tute ne konsciis sin kaj iris kiel ebria. Subite, de ĉiuj flankoj ekbrilis miliono da fajroj, io ekfajfis, ekkrakis. Pest ekkriis kaj ekkuris ien, ĉar ĉiuj kuris kaj ĉiuj kriis. Poste li surpuŝiĝis kaj falis sur la rotan komandanton, kiu estis vundita. Pest sin levis, kaj ia homo surpuŝiĝis sur lin per sia dorso en mallumo kaj denove preskaŭ faligis lin; alia homo kriis: „piku lin, por kio vi malatentas“. Li prenis pafilon kaj enŝovis bajoneton en ion molan. „Ha, Dio!“—iu ekkriis france kun terura korpremanta voĉo, kaj nur tiam Pest komprenis, ke li mortigis francon. Malvarma ŝvito eliĝis ĉe li sur tuta korpo, li ekstremis, kiel en febro, ĵetis la pafilon kaj ekkuris for de la mortigita franco. Trakurinte dudek piedojn, li alkuris en tranŝeon. Tie estis niaj kaj la bataliona komandanto.

VIII.

— Ĉu vi scias, Praskuĥin estas mortigita!—diris Pest, akompanante Kalugin'on, kiu iris al li.

— Ne estas eble!

— Jes, mi vidis mem.

— Adiaŭ, tamen: mi devas iri pli rapide.

„Mi estas tre kontenta,—pensis Kalugin, reirante al hejmo:—Bonega afero: mi estas viva kaj sana“.

Raportinte al la generalo ĉion, kio necesis, li venis sian ĉambron, en kiu princo Galcin sidis, jam delonge atendante lin.

Kun granda plezuro Kalugin eniris en sian domon, senvestiĝis, kuŝiĝis sur liton kaj komencis rakonti al Galcin, kion li vidis kaj aŭdis.

Apenaŭ Kalugin deiris de Miĥajlov kaj de Praskuĥin, subite ili ekvidis fulmon, hele ekbrilintan post ili, aŭdis krion de deĵoranto: „Markelo!“ kaj vortojn de unu el soldatoj, irantaj poste: „Ĝi alflugos ĝuste sur la bastionon!“

Miĥajlov ekrigardis reen kaj ekvidis, ke la bombo ĉiam pli proksime kaj pli rapide estis malsupreniĝanta kun fajfo rekte en mezon de la bataliono.

— Kuŝiĝu!—ekkriis ies voĉo.

Miĥajlov kaj Praskuĥin kuŝiĝis teren. Praskuĥin, ferminte okulojn, **nur** aŭdis, kiel la bombo ekbatiĝis je malmola tero ie tre proksime. Pasis unu sekundo, kiu ŝajnis horo,—la bombo ne eksplodis. Praskuĥin ektimis: ĉu ne vane li malkuraĝiĝis: eble, la bombo falis mal-

proksime. Li malfermis okulojn kaj ekvidis kun plezuro, ke Miĥajlov kuŝis tere senmove apud liaj piedoj. Sed kiam li levis la kapon, li ekvidis la turniĝantan bombon unu metron de li.

Teruro ĉirkaŭprenis lin. Li fermis vizaĝon per manoj.

Pasis ankoraŭ unu sekundo—sekundo, dum kiu li trameditis multon, multon kaj dum kiu li rememoris tutan sian antaŭan vivon, ĉiujn siajn esperojn.

„Kiun ĝi mortigos,—min aŭ Miĥajlov'on aŭ ambaŭ kune? Kaj se min, kien? Se kapon, tiam ĉio estas finita; kaj se piedon, tiam oni amputos, kaj mi povas ankoraŭ resti viva. Kaj eble, ĝi mortigos nur Miĥajlov'on: tiam mi rakontados, kiel ni iris kune, kaj ĝi lin mortigis kaj min nur ŝprucmakulis per sango... Ne, ĝi estas al mi pli proksima! Cetere, eble ĝi ne eksplodos“,—li pensis kaj volis malfermi okulojn. Sed tiun ĉi tempon, ankoraŭ tra fermitaj palpebroj, li ekvidis ruĝan fajron kaj io kun terura krako ekpuŝis lin en mezon de la brusto; li salte leviĝis, ekkuris ien, surpuŝiĝis sur ian sabron kaj falis flanken.

„Dank'al Dio! mi estas nur kontuzita“, li pensis kaj li volis tuŝi bruston per manoj, sed liaj manoj ŝajnis alligitaj, kaj iaj kunpremiloj premis la kapon. Li volis ekkrii, ke li estas kontuzita, sed lia buŝo estis tiel seka, ke la lango algluiĝis al la palato. Li terure volis trinki. Li sentis, kiel malseke estas ĉe li en la brusto. „Certe, mi sangebatiĝis, kiam mi falis“, li pensis. Al li fariĝis ĉiam pli terure, li kolektis ĉiujn siajn fortojn kaj volis ekkrii: „Prenu min!“ Sed anstataŭ tio ĉi li ekĝemis tiel

terure, ke al li mem estis terure aŭdi sin. Li ekpenis, rektiĝis kaj jam plu ne vidis, ne aŭdis, ne pensis kaj ne komprenis. Li estis mortigita sur loko per disrompaĵo je mezo de la brusto.

Miĥajlov, ekvidinte la bombon, falis teren kaj tiel ankaŭ, kiel Praskuĥin, trameditis kaj rememoris multon tiujn ĉi du sekundojn, dum la bombo kuŝis neeksplo-dinta. Li preĝis en pensoj al Dio kaj diris ĉiam: „Estu Via volo!“ — „ĉio estas finita: mi estas mortigita!“ li ekpensis, kiam la bombo eksplodis kaj li eksentis ekbaton je la kapo kaj fortan doloron. — „Sinjoro! pardonu miajn pekojn“, li elparolis, iom leviĝis kaj falis teren.

Kiam li rekonsciigis, li eksentis doloron en la kapo kaj sangon sur la frunto kaj sur la nazo... „Animo eliras, li pensis.—Kio estos tie? Sinjoro! akceptu mian animon kun paco. Nur jen kio estas stranga,—li konsideris: kiamaniere ĝi estas, mi mortas, tamen mi aŭdas paŝojn de soldatoj kaj pafojn“.

— Donu portilon... he! rotestro estas mortigita!—ekkriis super lia kapo la voĉo, kiun li ekkonis: parolis tamburisto Ignatjev.

Li prenis lin je ŝultroj. Li malfermis okulojn kaj ekvidis super la kapo malhelbluan ĉielon, stelojn kaj du bombojn, kiuj flugis super li, atingante unu alian, ekvidis Ignatjev'on, soldatojn kun portiloj kaj pafiloj, remparon de la tranŝeo,—kaj subite ekkredis, ke li ne estas ankoraŭ mortigita.

Li estis facile vundita je la kapo. La tamburisto ban-

daĝis per tuko la kapon de sia komandanto, kaj preninte lin sub brako ekkondukis lin al bandaĝejo.

„Kien kaj por kio mi iras?—ekpensis Miĥajlov, kiam li iom rekonsciigis.—Mi devas resti kun la roto, sed ne foriri antaŭen. Kaj la roto ankaŭ eliros baldaŭ el-sub pafado“,—murmuretis al li ia voĉo.

— Malnecesas, frato, —li diris kaj eltiris la manon for de la servema tamburisto: —mi ne ekiros bandaĝejon,—mi restos kun la roto.

Kaj li returnis sin.

— Estus pli bone, se vi bandaĝigu, via moŝto, kiel decas,—diris Ignatjev:—ja ĝi ŝajnas malgravaĵo nur pro vervro, sed poste povas esti pli malbone: ja jen kia varmega pafado estas ĉi tie... Vere, via moŝto!

Miĥajlov haltis por unu momento ŝanceliĝante, kaj, ŝajnas, li obeus Ignatjev'on, se li ne rememorus, kiel multaj malfacile vunditaj estas en bandaĝejo. „Eble, kuracistoj ekridetos je mia grataĵo“, ekpensis Miĥajlov kaj decide, malgraŭ vortoj de la tamburisto, ekiris reen al la roto.

— Kie estas oficiro Praskuĥin, kiu iris kun mi?—demandis li signojunkron, kiu kondukis la roton, kiam ili renkontiĝis.

— Mi nescias... ŝajnas, li estas mortigita,—nevolonte respondis la signojunkro.

— Kiel vi ne scias, ĉu li estas mortigita aŭ vundita? Ja li iris kun ni. Pro kio vi ne prenis lin?

— Nu kiel preni, kiam estas tia varmega pafado! Miĥajlov ekkoleris.

— He, kiel vi parolas tiel, Miĥajlo Ivànoviĉ, — kiel eble estas forlasi, se li estas viva; kaj eĉ se li estas mortigita, estis necese preni la korpon.

— Kiel li povas esti viva, kiam mi parolas al vi: mi mem aliris kaj vidis! diris la signojunkro.

Miĥajlov eksidis kaj ekkaptis sin je la kapo, kiu terure doloris pro irado.

— Se li estas viva tamen? — diris Miĥajlov. — Ne, necesas ekiri kaj preni lin, alie estos peko sur la animo. Por tio ni estas homoj, ke ni pensu ne nur pri si mem.

Miĥajlo Ivànoviĉ ne respondis.

„Jen li ne prenis tiam, kaj nun necesas sendi soldatojn. Sed kiel sendi! Sub tiu ĉi terura fajro oni povas mortigi vane“, pensis Miĥajlov...

— Kamaradoj! necesas reveni — preni oficiron, kiu estas vundita tie en kaveto, — diris li ne tre laŭte kaj ne tre severe. Li sciis, kiel malgrable estos por soldatoj plenumi tiun ĉi ordonon, — kaj efektive neniu eliris, por plenumi ĝin.

„Sed eble li jam mortis, kaj malnecesas sendi soldatojn; mi sola estas kulpa, ke mi ne zorgis. Mi ekiros mem — sciigos, ĉu li estas viva“, — diris Miĥajlov al si mem.

— Miĥajlo Ivànoviĉ! konduku la roton, kaj mi atingos vin tuj, — li diris, kaj ekkuris laŭ la transeo.

Li trovis la korpon de Praskuĥin, konvinkiĝis, ke li estas jam malviva, kaj ekkuris reen. La bandaĝo sur la kapo malordiĝis, kaj la kapo forte doloris. La bata-

liono estis jam apud malsupro de monto, kiam Miĥajlov atingis ĝin.

„Tamen, necesos morgaŭ viziti malsanulejon por enskribiĝi“, pensis Miĥajlov tiun tempon, kiam kuracista helpanto venis kaj komencis bandaĝi lin.

IX.

Centoj da freŝaj sangokovritaj korpoj de homoj kuŝis sur verda herbejo kaj sur ebena planko de kapelo en Sebastopolo. Centoj da homoj, kun malbenoj kaj preĝoj sur sekiĝintaj lipoj rampis, turnadis sin kaj ĝemis — unuj inter malvivuloj sur la herbejo, aliaj sur portiloj, sur litoj kaj sur la sangokovrita planko de la bandaĝejo; kaj en Dia mondo ĉio estis tiel same, kiel en antaŭaj tagoj, serena kaj trankvila: sentondre fulmis, steloj malheliĝis, blanka nebulo supreniĝis de la maro, ĉielruĝo ekbrulis oriente, — kaj tiel same, kiel en antaŭaj tagoj, estis leviĝanta la potenca bela suno.

Blankaj flagoj estas starigitaj sur nia bastiono kaj sur la franca transeo; kripligitaj korpoj kuŝas amase sur la herbejo, sen botoj, en grizaj kaj bluaj vestoj. Laboristoj alportas ilin kaj surmetas sur veturilojn; sentiĝasodoro de malviva korpo. El Sebastopolo kaj el franca tendaro amasoj de popolo eliris por rigardi tiun ĉi scenon.

Aŭskultu, kion tiuj ĉi homoj parolas inter si.

Jen en tiu ĉi grupo de rusoj kaj de francoj juna rusa oficiro parolas france; kvankam li parolas malbone, francoj komprenas lin. Li staras kaj atente rigardas sakon.

— Por kio birdo estas figurita ĉi tie? — li demandas.

— Ĉar ĝi estas sako de gvardia bataliono, kiu diferencas de aliaj per imperiestra aglo, respondas franco.

— Ĉu vi estas el gvardio?

— Ne, mi estas el sesa linia bataliono.

— Kie vi aĉeti ĝin? — la oficiro demandas, montrante sur lignan flavan cigaringon, en kiu la franco fumas cigaredon.

— En Balaklavo. Ĝi estas tre simpla objekto, el palma ligno, — respondas la franco...

— Bona objekto, — diras la oficiro.

— Se vi prenos de mi tiun ĉi objekton por memoro, mi estos tre ĝoja.

Kaj la ĝentila franco trablovas cigaredon kaj donas kun malgranda saluto al la oficiro la cigaringon. La oficiro donas al li sian, kaj ĉiuj ĉirkaŭe, kiel francoj, tiel rusoj, ŝajnas tre kontentaj kaj ridetas.

Jen infanteria vigla soldato, en rozkolora ĉemizo kaj en mantelo, surĵetita sur ŝultroj, kune kun aliaj soldatoj gajaj kaj kontentaj, aliras al franco kaj petas ĉe li fajron por ekfumi pipon. La franco donas fajron al la ruso.

— Tabako... bona... — diras la soldato en rozkolora ĉemizo, — kaj ĉiuj ridetas.

— Jes, bona... tabako; tabako... turka; kaj rusa tabako... bona? diras la franco.

— Rusa... bona, — diras la soldato en rozkolora ĉemizo, kaj ĉiuj ridegas. — Franca... ne... bona, bontagon... sinjoro! — diras la soldato en rozkolora ĉemizo, elparolante per unu fojo tutan sian provizon de francaj

vortoj kaj frapetas la francon je la ventro kaj ridas. Francoj ridas ankaŭ.

— Pri kio ili ridas tie? — diras alia franco, alirante al niaj.

— Kaftano... bona, — diras vigla soldato, rigardante broditajn baskojn de franca uniformo, kaj denove oni ridas.

— Ne transiru linion, sur loĝojn! — ekkriis franca estro, kaj soldatoj disiras nevolonte.

Nun rigardu tiun ĉi dekjaran knabon, kiu en malnova, eble patra ĉapo, en botoj sur nudaj piedoj kaj en nankenaj pantolonoj, eliris de la komenco mem de interpaco trans la remparon kaj ĉiam iradis, rigardadis francojn kaj korpojn, kuŝantajn sur tero, kaj ŝiris kaj kolektadis bluajn florojn. Reirante hejmen kun granda bukedo, li fermis la nazon pro malbonodoro kaj haltis apud amaso da korpoj kaj longe rigardis unu teruran senkapan kadavron. Starinte sufiĉe longe, li aliris pli proksime kaj tuŝis per la piedo etenditan rigidiĝintan brakon de kadavro, — la brako iom ekbalanciĝis. Li tuŝis ĝin ankoraŭ unu fojon kaj pli forte — la brako ekbalanciĝis kaj denove okupis antaŭan sian pozicion. La knabo subite ekkriis, kaŝis sian vizaĝon en floroj kaj ekkuregis for, al la citadelo.

Jes! Blankaj flagoj estas elstarigitaj sur la bastiono kaj sur la tranŝeo, kaj malvivaj korpoj kuŝas sur la herbejo. Miloj da homoj amasas, rigardas, parolas kaj ridetas unuj al aliaj. Kaj tiuj ĉi homoj estas kristanoj, konfesantaj grandan leĝon de amo kaj de servado al

aliaj. Do kiamaniere ili, rigardante tion, kion ili faris, ne ekpentas, ne ekfalas sur genuoj antaŭ Tiu, Kiu donis al ili vivon, enmetis en iliajn animojn amon al bono, ne enbrakigas unuj aliajn, kiel fratoj, kun larmoj de ĝojo kaj feliĉo? Ne! Blankaj flagoj estas jam formetitaj, kaj denove fajfas kuglegoj, denove verŝiĝas senkulpa sango, aŭdiĝas ĝemoj kaj malbenoj.

SEBASTOPOLO EN AŬGUSTO DE 1855 JARO.

I.

En fino de aŭgusto veturilo veturis laŭ vojo al Sebastopolo. Antaŭe sidis soldato-servisto en malnova nankenena surtuto kaj en dissirita oficira ĉapo; post li, sur paketoj, sidis oficiro. La oficiro estis vundita per disrompaĵo je la kapo; nun li resaniĝis kaj veturis el mal-sanulejo por denove servi en sia regimento.

Ili alveturis al poŝta stacidomo; la oficiro malsupreniĝis el la veturilo kaj eniris ĉambron. En la ĉambro estis multaj oficiroj, kuŝis iliaj valizoj kaj aĵoj, tiel ke la alveturinto preskaŭ ne povis trovi al si lokon. Li sidigis apud fenestro, ekfumis cigaredon kaj komencis rigardi oficirojn.

Grasa virino eniris ĉambron; supujo kun barĉo estis en ŝiaj manoj. Ŝi demandis:

— Kiu petis barĉon?

— Kozelcev petis. Necesas veki lin,—respondis unu oficiro al ŝi kaj aliris al benko.

Sur la benko dormis juna knabo, deksepjara. La oficiro vekis lin. La alveturinta oficiro ekrigardis la knabon, sin levis kaj aliris al li. Ĝi estis lia malpliaga frato.

— Voĉjo, ĉu vi ne ekkonas? — demandis pliaga Kozelcev.

La malpliaga frato sin ĵetis al li kaj enbrakigis lin.

— Jen kie ni renkontiĝis! Kiel mi estas ĝoja. Iru sur peronon, interparolu.

— Ja vi volis tagmangi?

— Ne, nun mi ne volas.

Ili eliris sur la peronon.

La pliagulo demandis pri parencoj, kaj la malpliagulo ĉiam demandis, kiel oni vivas en milito, kaj ĉu ne estas tie ĉi tre terure.

Poste ili ekveturis Sebastopolon.

Kiam ili alveturis, pliaga Kozelcev volis iri al sia regimento kaj sciigi, kie staras baterio de lia frato. Sed Voĉjo ne volis resti sola kaj diris:

— Estas pli bone, se ni ekiros bastionon kune; ja, tute egale, mi devas alkutimiĝi.

Ili ekiris, transiris unuan ponton kaj haltis sur dua, kiu ialoke estis jam superakvita. Vento, kiu en kampo ŝajnis malforta, estis ĉi tie tre forta kaj puŝblovanta; la ponto balanciĝis, ondoj ekbatiĝadis kun bruo je traboj de la ponto kaj superakvadis tabulojn. Rajdanto veturis preter ili. Li haltis apud pliaga Kozelcev kaj diris:

— Ha, Mihajlo Simeonoviĉ! Ĉu vi jam tute resaniĝis?

— Kiel vi vidas. Kien Dio portas vin?

— Sur Nordan albordiĝejon... por kartuŝoj; ja mi anstataŭas hodiaŭ regimentan adjutanton. Ni atendas atakegon de horo al horo.

— Kie estas Marcov?

— Hieraŭ forŝiris al li la piedon. Li dormis en urbo, en ĉambro... Eble, vi konas lin!..

— Ĉu la regimento estas sur kvina, vere?

— Jes, ĝi anstataŭis Mohilevan regimenton. Vi vizitu bandaĝejon: tie estas niaj,—oni akompanos vin.

— Ĉu mia loĝejo, sur Morskaja strato, estas sendifekta?

— He, frato! jam antaŭlonge bomboj disbatis ĝin tutan... Nun vi ne ekkonos Sebastopolon: jam estas nek virinoj, nek restoracioj, nek orkestro; hieraŭ lasta restoracio forveturis. Nun fariĝis tre malgaje... Adiaŭ!

Kaj la oficiro ekrajdis pluen.

Al Voĉjo subite fariĝis tre terure: al li ĉiam ŝajnis, ke tuj kuglego alflugos aŭ disrompaĵo ekbatos lin rekte je la kapo.

Li profunde ekspiris kaj deiris iom flanken de la frato.

„Sinjoro! ĉu efektive oni mortigos min,—nome min? Sinjoro, indulgu min!“—diris li murmurete kaj faris krucan signon.

— Nu, ni ekiru, Voĉjo,—diris la pliaga frato.—Ĉu vi vidis bombon?

Sur ponto renkontiĝis al la fratoj veturiloj kun vun-

ditoj kaj unu veturilo kun meblaro, kiun veturigis ia virino. Je alia flanko de la golfo neniu renkontiĝis al ili.

La fratoj ekiris silente apud muro de Nikolaa baterio, aŭskultante, kiel bomboj eksplodadis super iliaj kapoj kaj disrompaĵoj faladis de supre; ili venis al tiu loko, kie estis sanktobildo; tie ĉi ili [sciigis, ke la kvina facilbaterio, al kiu Voĉjo estis destinita, staras sur la Ŝipa albordiĝejo, kaj ili decidis, malgraŭ danĝero, iri kune al plejaga frato sur kvinan bastionon por pasigi nokton, kaj de tie—morgaŭ sur baterion. Ili sin direktis vestiblon kaj, paŝante trans piedoj de dormantaj soldatoj, kiuj kuŝis laŭlonge de tuta muro de baterio, venis bandaĝejon.

En unua ĉambro kun litoj, sur kiuj vunditoj kuŝis, estis terure malagrabla abomena malsanuleja malbonodoro. Tie ĉi ili renkontis du flegistinojn, kiuj iris renkonte al ili.

Unu virino, kvindekjara, portis bandaĝaĵon kaj ordonis ion al juna knabo, kuracista helpanto, kiu iris post ŝi, alia—bela fraŭlino, dudekjara, kun pala kaj delikata vizaĝo—iris apud la pliaga.

Kozelcev demandis ilin, ĉu ili scias, kie estas Marcov, ĉe kiu la piedo estis forŝirita hieraŭ.

— Ŝajnas, li estas de Podola regimento?—demandis la pliaga flegistino.—Ĉu li estas via parenco?

— Ne, li estas kamarado.

— Akompanu ilin,—ŝi diris al la malpliaga flegistino—jen tien ĉi—kaj ŝi mem aliris kun la helpanto al vundito.

— Nu, iru,... kion vi rigardas?—diris Kozelcev al Voĉjo, kiu, levinte brovojn, rigardis kompateme vunditojn kaj povis neniel deturni de ili okulojn.—Iru!

Voĉjo ekiris kun la frato; voje li ĉiam ekrigardadis reen kaj murmuretis:

— Ha, mia Dio! Ha, mia Dio!

— Certe, vi estas tie ĉi antaŭnelonge?—la flegistino demandis Kozelcev'on, montrante sur Voĉjon, kiu, vekriante kaj ekspirante, iris post li laŭ koridoro.

— Li ĵus alveturis.

La bela flegistino ekrigardis Voĉjon kaj subite ekploris kaj elparolis.

— Mia Dio, mia Dio! kiam ĉio tio ĉi finiĝos?

Ili eniris en oficiran ĉambron. Marcov kuŝis sur dorso, forĵetinte muscolecajn nudajn ĝis kubutoj brakojn post la kapon kaj forte kunpremite dentojn, por ke ne krii pro doloro. La restinta piedo estis en ŝtrumpo, estis elstarigita el-sub litkovrilo, kaj estis vidate, kiel li konvulsie movetis piedajn fingrojn pro doloro.

— Nu, kiel estas al vi?—demandis la flegistino; ŝi gardeme levis lian kapon kaj ordigis kusenon.—Jen viaj kamaradoj venis por viziti vin.

— Certe, doloras! — li diris kolere.—Forlasu, tiel ankaŭ estas bone!..

La fingroj en la ŝtrumpo ekmovetiĝis ankoraŭ pli rapide.

— Bonan tagon! Kia estas via nomo?—li demandis Kozelcev'on... Ha, jes, pardonu — eble estas forgesi ĉion,—li diris, kiam tiu diris al li sian nomon.—Ja ni

loĝis kune kun vi?—li aldiris sen ia ĝojo kaj ekrigardis Voĉjon.

— Ĝi estas mia frato, li alveturis hodiaŭ el Peterburgo.

— Hm! jen mi elservis plenan pension... li diris, sulkiĝante vizaĝon.—Ha, kiel doloras!.. Estos jam pli bone, se fino estos pli baldaŭ...

Li ekkonvulsis la piedon, ekmovetis ĝiajn fingrojn ankoraŭ pli rapide kaj fermis la vizaĝon per la manoj.

— Necesas lin forlasi,—la flegistino diris murmurete, kun larmoj sur okuloj:—al li estas tre malbone.

La fratoj eliris el la Nikolaa baterio kaj decidis iri dise.

— Nur, kiel vi trovos, Voĉjo?—diris la pliaĝa.—Certe, Nikolaev akompanos vin sur Ŝipan albordiĝejon, kaj mi ekiros sola; morgaŭ mi estos ĉe vi.

Ili diris plu nenion unu al alia dum tiu ĉi lasta adiaŭado.

II.

Bruego de paflegoj daŭris kun la sama forto, kiam Voĉjo kune kun Nikolaev iris laŭ Ekaterina strato; la strato estis malplena, nur oficiroj kaj soldatoj renkontiĝis iafeje. Voĉjo aŭdis siajn paŝojn kaj la paŝojn de Nikolaev, kiu iris post li kaj spiris malfacile. Bomboj eksplodadis, fajfadis ĉiam pli proksime, kaj Nikolaev ekspiradis ĉiam pli ofte. Ili estis alirantaj al ponto, kiu kondukis sur Ŝipan albordiĝejon, kaj ekvidis, kiel io fajfante falis en akvon ne malproksime de ili,

lumigis ondojn por unu sekundo kaj poste leviĝis kun ŝprucoj.

— Jen, ĝi ne sufokiĝis!—Nikolaev diris raŭke.

Renkontiĝadis portiloj kun vunditoj, denove regimentaj veturiloj. Ia regimento renkontiĝis sur Ŝipa albor-diĝejo; rajdantoj preterveturadis.

Supreniĝinte surmonten preter ia blanka muro, Voĉjo eniris straton, kie domoj estis disbatitaj. Tie ĉi bomboj fajfadis ankoraŭ pli ofte kaj eksplodadis proksime de li. Nikolaev ekspiris kaj ekparolis, kiel ekŝajnis al Voĉjo, per timigita voĉo:

— Jen vi ĉiam rapidis veturi el gubernio! Veturi kaj veturi! He, estas, kien rapidi!

— Nu, kion, se la frato estas jam sana,—respondis Voĉjo.

Li volis kvankam per interparolado dispeli timon, kiu komencis ataki lin.

— Sana... Kia estas lia sano, kiam li estas tute malsana!? Kiuj havas veran sanon, eĉ por ili estus pli bone vivi en malsanulejo tian tempon. Ĉu estas tie ĉi multo da ĝojo. Ĝi forŝiros aŭ piedon aŭ brakon—kaj jen ĉio! Ja tie ĉi en urbo estas ne tiel, kiel sur la bastiono, tamen eĉ tie ĉi kiel estas terure! He, kiel ĝi fajfegas!—li aldiris, kiam ia disrompaĵo trafajfis proksime de li:—jen, nun,—daŭris Nikolaev,—oni ordonis akompani vian moŝton. Nia afero estas difinita: kio estas ordonita, tion ni devas plenumi; sed ni restigis veturilon ja al iu soldataĉo, kaj paketo estas malligita... Iru kaj iru; sed se io el havaĵo malaperos—Nikolaev respondos.

Pasinte ankoraŭ kelkajn paŝojn, ili eliris sur placon. Nikolaev silentis kaj ekspiradis.

— Jen via artilerio staras, via moŝto!—diris li subite.—Demandu deĵoranton: li montros al vi.

Voĉjo pasinte kelkajn paŝojn, ĉesis aŭdi post si ekspirojn de Nikolaev. Li demandis deĵoranton pri domo de bateria komandanto kaj ekiris tien.

III.

Domo de bateria komandanto estis negranda, duetaĝa; eniro estis de la korto. En unu el fenestroj, fermitaj per algluita papero, lumetis malgranda fajro de kandelo. Soldato-servisto sidis sur perono kaj fumis pipon. Li ekiris por raporti al la bateria komandanto kaj enkondukis Voĉjon en ĉambron. En la ĉambro, inter du fenestroj sub disbatita spegulo, staris tablo, troplenigita per oficialaj paperoj, kelkaj seĝoj kaj fera lito kun pura litotolaĵo.

Apud pordo mem staris bela viro kun grandaj lipharoj—ĉefserĝento kun mallonga sabro kaj en mantelo. Meze de la ĉambro nealkreska kvardekjara oficiro kun transligita ŝvelinta vango, en maldika nenova mantelo, iradis tien kaj reen.

— Mi havas honoron min prezenti, mi estas alsendita en kvinan baterion signojunkro Kozelcev 2-a!—elparolis Voĉjo, enirante la ĉambron.

La bateria komandanto malafable respondis al la saluto kaj ne donante la manon li invitis lin sidiĝi.

— Kie estas viaj havaĵoj? li demandis subite Voĉjon.

Voĉjo respondis, ke havaĵoj estas sur la Grafa albor-diĝejo kaj ke la frato promesis morgaŭ alveturigi ilin.

La kolonelo ne ĝisaŭskultis lin, sin turnis al la ĉef-serĝento kaj demandis:

— Kie ni loĝigos la signojunkron?

— Signojunkron?—diris la ĉefserĝento.—Jen malsupre, via moŝto,—li daŭrigis, pensinte iom,—nun stabkapitano estas sur la bastiono, kaj lia lito estas libera.

— Jen, se plaĉas al vi, dume!—diris la bateria komandanto.—Vi, mi opinias, estas laca; morgaŭ ni aranĝos pli bone.

Voĉjo sin levis kaj salutis.

— Ĉu vi deziras teon?—diris la bateria komandanto, kiam Voĉjo jam aliris al la pordo.—Eble estas pretigi samovaron.

Voĉjo ekklinis sin kaj eliris. Subkolonela soldato-servisto akompanis lin malsupren kaj enkondukis nudan kotan ĉambron, en kiu senorde kuŝis diversaj malnovaĵoj kaj staris fera lito sen litotolaĵo kaj sen litkovrilo. Ia homo en rozkolora ĉemizo dormis sur la lito, sin kovrinte per dika mantelo.

Voĉjo opiniis lin soldato.

— Petro Nikolàevič!—diris la servisto, puŝante la dormantan je ŝultro.—Signojunkro kuŝos tie-ĉi... Ĝi estas nia junkro,—li aldiris, sin turnante al Voĉjo.

— He, ne maltrankviliĝu, mi petas!—diris Voĉjo.

Sed la junkro, alta korpulenta juna homo, sin levis de la lito, surĵetis mantelon sur ŝultrojn kaj, videble, nemaldormiĝinte ankoraŭ entute, eliris el la ĉambro.

— Estas malgrave, mi kuŝigos sur korto,—li murmuris.

Restinte sola, Voĉjo estingis kandelon, kuŝiĝis sur la liton, demetis de si la mantelon kaj sin kovris per ĝi kun la kapo. Subite en lian kapon venis penso, ke bombo alflugos, trabatos tegmenton kaj mortigos lin. Li komencis atente aŭskulti. „Nu, se oni prenos subite nokte Sebastopolon, kaj francoj enpenetros tien ĉi? Kion mi faros tiam? Mi estas malkuraĝulo, abomena malkuraĝulo!“—subite li ekpensis. Kaj al li revigis vunditoj kaj sango, bomboj kaj disrompaĵoj, kiuj enflugas ĉambron, jen bela flegistino, kiu bandaĝas lin kaj ploras super li, jen lia patrino, kiu, kiam li estis ekiranta, preĝis varmege, kun larmoj... kaj subite li rememoris pri Dio. Li genufleksis kaj faris krucan signon.

Sinjoro Granda! Vi sola aŭdis kaj konas tiujn simplajn varmegajn preĝojn de pento kaj de heliĝo de animo, kiuj supreniris al Vi de tiu ĉi terura loko de morto, komencante je generalo, finante je simpla soldato...

IV.

Pliiĝa Kozelcev renkontis sur strato soldaton de sia regimento kaj ekiris kune kun li rekte al la kvina bastiono.

— Tenu vin sub muro, via moŝto!—diris la soldato.

— Pro kio?

— Estas danĝere, via moŝto; jen ĝi jam flugas transe!—diris la soldato, montrante sur kuglegon, kiu kun

fajfo ekbatigis je seka grundo sur kontraŭa flanko de la strato.

Kozelcev, ne obeante soldaton, vigle ekiris meze de la strato.

Cie estis tiaj samaj stratoj, tiaj samaj fajroj, sonoj, ĝemoj, renkontoj kun vunditoj kaj tiaj samaj baterioj, brustveroj, tranŝeoj, kiaj estis printempe, kiam li estis en Sebastopolo; sed pro io ĉio tio ĉi estis nun pli malgaja, trabataĵoj en domoj estis pli multaj, fajroj en fenestroj jam tute ne estis, krom malsanulejo; neniam vi rino renkontigis.

Jen estas jam lasta tranŝeo, jen voĉo de soldato de Podola regimento; soldato ekkonis sian antaŭan rotan komandanton; jen tria bataliono staras en mallumo, sin alpremite al muro.

— Kie estas la komandanto de la regimento?—demandis Kozelcev.

— En blindago, ĉe ŝipistoj, via moŝto,—respondis la servema soldato.—Se plaĉas al vi, mi akompanos vin.

La soldato alkondukis Kozelcev'on al kaveto en tranŝeo. En kaveto sidis ŝipano kaj fumis pipon; post li vidigis pordo, en kies fendo traviĝis lumo.

— Ĉu mi povas eniri?

— Mi tuj raportos,—kaj la ŝipano eniris tra la pordo.

La blindago estis komforta. Planko estis firma kaj ebena. Du litoj estis metitaj apud muroj. Sur unu el la litoj dormis ŝipano, tute vestita, sur alia, antaŭ tablo, sidis kaj interparolis nova regimenta komandanto kaj lia adjutanto.

— Nu longe vi kuraciĝis,—diris la kolonelo al Kozelcev.

— Mi estis malsana, sinjoro kolonelo! Kaj nun la vundo ankoraŭ ne fermiĝis entute.

— Tiaokaze vi vane alveturis... Ĉu vi tamen povas servi?

— Jes, mi povas.

— Nu, mi estas tre ĝoja... Vi akceptos de signojunkro Zajĉev la naŭan roton,—vian antaŭan; tuj vi ricevos ordonon.

— Mi obeas!

Kozelcev eliris el la blindago kaj antaŭ ol iri al siaj oficiroj, li ekiris saluti sian roton kaj rigardi, kie ĝi staras.

Kozelcev eniris en longan tute malfermitan de flanko de eniro blindagon, en kiu, kiel oni diris al li, lokiĝas la naŭa roto. Eĉ por piedo ne estis loko en tuta blindago: tiel ĝi estis troplenigita per soldatoj. En unu ĝia flanko lumis seba kurba kandelo. Soldato kuŝante tenis kandelon, lumigante libron, kiun alia soldato legis laŭsilabe. Ĉirkaŭ la kandelo vidigis levitaj kapoj, kiuj kun interese aŭskultis legadon. Libro estis alfabeto. Enirante la blindagon, Kozelcev ekaŭdis vortojn:

„Mi dankas Vin, Kreinto“...

— Ordigu la kandelon!—diris voĉo.—Libro estas bona. „Dio“...—daŭris la leganto.

Kiam Kozelcev demandis ĉefserĝenton, la leganto silentiĝis, la soldatoj ekmovetiĝis, ektusis, ekpurigis nazojn; la ĉefserĝento, butonumante, sin levis apud la le-

ganto kaj, paŝante trans kaj sur piedoj de tiuj, kiuj ne sciis kien kaŝi piedojn, eliris al la oficiro.

— Bonan tagon, frato! Ĉu ĝi estas nia roto?

— Bonan tagon! Ni gratulas vin kun alveturo, via moŝto,—respondis la ĉefserĝento, rigardante Kozelcev'on gaje kaj amike.—Kiel estas via sano, via moŝto? Nu jen, dank'al Dio! Mi ja tute ekenuis je vi.

Tuj estis vidate, ke oni amis Kozelcev'on en la roto. En la blindago aŭdiĝis voĉoj: „Antaŭa rotestro alveturis, kiu estis vundita, Kozelcev Miĥajlo Simeonoviĉ“. Iuj eĉ almoviĝis al li; tamburisto salutis.

— Bonan tagon, Obanĉuk!—diris Kozelcev.—Ĉu vi estas viva kaj sana?—Bonan tagon, fratoj!—diris li poste per laŭta voĉo.

— Bonan tagon!—ekbruis en la blindago.

— Kiel vi fartas, kamaradoj?

— Malbone, via moŝto: franco superfortas,—batas el redutoj, kaj jen! Sed li ne eliras en kampon.

De soldatoj Kozelcev ekiris kazernon al kamaradoj oficiroj.

En granda ĉambro de la kazerno estis multego da homoj: ŝipaj, artileriaj kaj infanteriaj oficiroj. Unuj dormis; aliaj interparolis, sidante sur ia kesto kaj sur afusto de citadela paflego; iuj sidis sur flanko, sur du disternitaj burkoj, trinkis porteron kaj ludis je karto.

— Ha, Kozelcev, Kozelcev! Bone, ke vi alveturis! Bravulo! Nu, kiel estas via vundo?—ekaŭdiĝis de diversaj flankoj.

Kaj tie ĉi estis vidate, ke oni amas lin kaj ĝojas pro lia alveturo.

V.

Alian tagon pafado daŭris kun tiu sama forto. Je la dekunua horo de mateno Voĉjo Kozelcev sidis en grupo de bateriaj oficiroj; li jam iom alkutimiĝis al ili; li enrigardadis novajn vizaĝojn, demandadis, rakontadis. Modesta interparolo de artileriaj oficiroj plaĉis al li, kaj la oficiroj ekamis lin pro lia bela kaj bona vizaĝo. Junkro Vlang, kiun li maldormigis hieraŭ, estis ankaŭ ĉi tie. Li parolis nenion, sidis modeste en angulo, ridis, kiam estis io ridinda, rememorigis, kiam oni forgesis ion, donis brandon kaj faris cigaredojn por ĉiuj oficiroj. Al Vlang plaĉis modestaj ĝentilaj manieroj de Voĉjo, kiu kondukis rilate al li tiel same, kiel rilate al oficiroj, kaj ne malsatis lin; li ne deturnis de la vizaĝo de la nova oficiro siajn bonajn grandajn okulojn, penis komplezi kaj plenumi ĉiujn liajn dezirojn.

Antaŭ tagmango stabkapitano Kraŭt liberiĝis de la bastiono kaj venis al ili.

— Jen li! — diris la kapitano, dum Kraŭt, svingante manojn kaj tintante per spronoj, estis eniranta ĉambron.

— Al mi estas tre agrable konatiĝi kun vi; mi petas ami kaj viziti nin,—li diris al Voĉjo, kiu, sin levinte, salutis lin.—Stabkapitano Kraŭt... Ĉefserĝento diris al mi sur la bastiono, ke vi venis jam hieraŭ.

— Mi estas tre danka al vi pro via lito: mi pasigis nokton sur ĝi.

— Ĉu estis al vi trankvile?.. Tie unu piedeto estas

rompita, kaj neniŭ estas, kiu riparus ĝin—necesas ion submeti sub ĝin.

— Nu, ĉu vi bonstate deĵoris?—demandis Dĵadenko.

— Jes, ne malbone; nur Skvorcov estis vundita, kaj oni „riparis“ unu afuston: oni disbatis stablon je splitoj.

Li sin levis kaj komencis iradi.

— Vlang! alportu al mi mian pipon kaj plenigu ĝin je tabako!—li diris al junkro, kiu tuj ekkuris volonte por la pipo.

Kraŭt gajigis ĉiujn: li rakontis pri bombardado, demandis, kio estis farita sen li, parolis kun ĉiuj.

Soldato-servisto de la kolonelo venis kaj invitis ĉiujn manĝi.

La tablo estis formovita de la muro kaj kovrita per malpura tablotuko en tiu sama ĉambro, en kiu Voĉjo hieraŭ sin prezentis al la kolonelo. La bateria komandanto hodiaŭ donis al li la manon kaj demandis pri Peterburgo kaj pri vojaĝo.

— Nu, sinjoroj, kiu trinkas brandon,—mi petas. Sinjorkoj ne drinkas,—li aldiris ridetante.

La bateria komandanto ŝajnis hodiaŭ tute ne tiel severa, kiel hieraŭ; male, li havis mienon de bona gastama mastro kaj de pliaĝa kamarado inter oficiroj. Sed, malgraŭ tio, ĉiuj oficiroj montris al li grandan respekton.

La tagmanĝo konsistis el granda supujo de brasika supo, en kiu naĝis grasaj pecoj de viando kaj granda kvanto da pipro kaj laŭraj folioj, el kotletoj kun mustardo kaj el kuketoj kun ne tre freŝa butero. Buŝtukoj

malestis, kuleroj estis ladaĵ kaj lignaj, estis du glasoj, kaj sur la tablo staris nur karafo da akvo kun forbatita koleto; sed la tagmanĝo estis gaja: ĉiuj interparolis. Dum tagmanĝo, nemalproksime de tiu domo, en kiu ili sidis, falis bombo. La planko kaj la muroj ek-tremis, kiel pro tertremo, kaj fenestroj ŝirmiĝis per pulva fumo.

— Mi opinias, vi ne vidis tion ĉi en Peterburgo. Kaj tie ĉi ĝi okazas ofte,—diris la bateria komandanto.—Rigardu, Vlang, kie ĝi eksplodis.

Vlango rigardis kaj raportis, ke—sur placo, kaj nenia parolo estis plu pri bombo.

Antaŭ la fino mem de la tagmanĝo maljunulo, bateria skribisto, eniris ĉambron kun tri sigelitaj kovertoj kaj donis ilin al la bateria komandanto:

— Jen tiu ĉi estas plej grava, kazako tuj alveturigis de estro de artilerio.

Ĉiuj oficiroj rigardis kun senpacienca atendo la baterian komandanton. „Kio povas esti!“—ĉiu pensis. Ĝi povis esti eliro de ĉiuj el Sebastopolo por ripozo; ĝi povis esti ankaŭ destino de tuta baterio sur bastionojn.

— Denove!—diris la bateria komandanto kaj ĵetis kolere paperon sur la tablon.

— Pri kio, Apolono Sergĉjeviĉ?—demandis unu el oficiroj.

— Oni postulas oficiron kun servistoj sur ian baterion... Ĉe mi restis nur kvar oficiroj, plena komplekto de servistoj ne estas,—murmuris la bateria komandanto,—kaj oni postulas ankoraŭ. Tamen, iu devas ekiri,

sinjoroj,—li diris, iom silentinte.—Oni ordonas esti je la sepa horo... Venigu ĉefserĝenton! Nu, kiu el vi ekiros? Decidu,—li ripetis.

— Ja li ankoraŭ estis nenie,—diris iu, montrante sur Voĉjon.

La bateria komandanto respondis nenion.

— Jes, mi dezirus,—diris Voĉjo kaj sentis, kiel malvarma ŝvito eliĝis ĉe li sur la dorso kaj sur la kolo.

— Ne, por kio!—interrompis la kapitano.—Certe, neniu rifuzos, sed ankaŭ malnecesas sin proponi. Estos pli bone, se ni lotos, kiel ni jam faris unu fojon.

Ĉiuj konsentis. Kraŭt tranĉis paperetojn, kunvolvis ilin kaj surŝutis en ĉapon. La kapitano ŝercis kaj eĉ decidis ĉe tia okazo peti de la subkolonelo vinon, „por kuraĝo“, kiel li diris. Djadenko sidis malgaja. Voĉjo ridetis pro io. Kraŭt estis tute trankvila.

Oni proponis al Voĉjo, ke li unua prenu loton. Li prenis unu papereton, disvolvis kaj legis sur ĝi „iri“.

— Al mi,—li diris kaj ekspiris.

— Nu, kun Dio! Jen vi alĉutimiĝos al pafado per unu fojo,—diris la komandanto, rigardante kun bona rideto la konfuzitan vizaĝon de la signojunkro:—nur pretigu vin pli baldaŭ. Kaj por ke estu al vi pli gaje, Vlang ekiros kun vi.

VI.

Vlang estis tre kontenta je sia destino, rapide ekkuris pretiĝi kaj, vestita, venis por helpi Voĉjon. Voĉjo rimarkis por sia miro kaj ĝojo, ke nun li jam tute ne

tiel timis, kiel hieraŭ. Je la sepa horo, kiam la suno komencis kaŝiĝi post Nikolaa kazerno, la ĉefserĝento eniris al li kaj diris, ke homoj estas pretaj kaj atendas.

— Mi fordonis skribordonon al Vlang. Vi bonvolu demandi de li, via mosto!—li diris.

Dudek artileriaj soldatoj, kun mallongaj sabroj, staris post angulo de la domo. Voĉjo kune kun la junkro aliris al ili kaj kuraĝe ekkriis per sia sonplena voĉo: „Saluton, bravuloj!“ Al soldatoj estis agrable aŭdi lian junan freŝan voĉon, kaj ili gaje respondis al lia saluto. Voĉjo vigle iris antaŭ la soldatoj, kaj kvankam lia koro tiel batis, kvazaŭ li trakuregis kelkajn kilometrojn, lia irado estis facila, kaj la vizaĝo estis gaja. Alirante jam al Malaĥova kurgano mem (tiel nomiĝis antaŭa fortikaĵo, estinta preskaŭ en mezo de vico de sebastopolaj baterioj; tiu ĉi loko opiniĝis plej danĝera en Sebastopolo) kaj supreniĝante sur monton, li rimarkis, ke Vlang, kiu postrestis lin je nenioma paŝo kaj hejme ŝajnis tia kuraĝulo, senĉese flankeniĝadis kaj klinadis la kapon, kvazaŭ ĉiuj bomboj kaj kuglegoj, kiuj fajfis tie ĉi jam tre ofte, flugis rekte sur lin. Kelkaj soldatoj faris tion saman kaj ĝenerale plejparto da vizaĝoj esprimis maltrankvilon. Cio tio ĉi tre trankviligis Voĉjon, kaj li pensis:

„Nu, jen mi estas sur Malaĥova kurgano! Mi opiniis, ke ĝi estas milfoje pli terura... Kaj mi povas iri, ne klinante min antaŭ kuglegoj, kaj malkuraĝas malpli ol aliaj. Sekve, mi ne estas malkuraĝulo?“

Krepuske Voĉjo kun siaj soldatoj aliris al sia blinda-

ĝo. La blindago, al kiu akompananto alkondukis lin, estis simpla kavo je kvar metroj, kovrita per dikegaj kverkaj traboj. En ĝi li lokiĝis kun ĉiuj siaj soldatoj. Vlang, apenaŭ li ekvidis malaltan pordeton de la blindago, enkuregis antaŭ ĉiuj tra ĝi kaj, preskaŭ disbatinte sin je ŝtona planko, eniĝis en angulon, el kiu li jam plu ne eliris. Ĉiuj soldatoj lokiĝis laŭlonge de muroj sur la planko; iuj ekfumis pipojn; Voĉjo starigis sian liton en angulo, bruligis kandelon kaj, ekfuminte pipon, kuŝiĝis sur la liton. Senĉesaj pafoj aŭdiĝis super la blindago, sed ne tre laŭte. En la blindago mem estis mal-laŭte; la soldatoj ankoraŭ konfuziĝis la novan oficiron, malofte interparoladis, petante unu alian flankeniĝi aŭ petante fajron por ekfumi pipon. Vlang ĉiam ankoraŭ ne rekonsciiĝis pro timo, rigardis ĉirkaŭe kaj laŭte ekspiradis.

Post dek minutoj la soldatoj alkutimiĝis kaj ekinterparolis. Plej proksime al fajro kaj al la lito de la oficiro lokiĝis homoj pli signifaj—du artileriaj serĝentoj: unu—griza, maljuna, alia—juna, fumanta hungaran cigaredon. Tamburisto, kiel ĉiam, prenis sur sin servi al la oficiro. Bombardistoj kaj kavaliroj sidis pli proksime; kaj tie, en ombro, apud eniro, lokiĝis simpluloj. Inter ili komenciĝis interparolo. Iu homo eniris la blindagon kaj aliĝis al ili.

— He, frato, pro kio vi ne restis sur la strato? Ĉu fraŭlinoj kantas ne gaje?—diris unu voĉo.

— Oni kantas tiajn mirindajn kantojn, kiajn oni neniam aŭdis en vilaĝo,—diris ridante tiu, kiu enkuris blindagon.

— Vasin ne amas bombojn, he, kiel li ne amas,—diris unu el la soldatoj.

— Nu ja! Kiam necesas, ĝi estas tute alia afero,—Vasin diris, ne rapidante; kiam li paroladis, ĉiuj aliaj eksilentadis. — Je 24-a oni jen pafis, almenaŭ! Se oni mortigos vane, ja estraro ne dankos nin por tio-ĉi.

Ĉe tiuj ĉi vortoj de Vasin ĉiuj ekridis.

— Jen Mèlnikov, li ja ĉiam sidas sur korto,—iu diris.

— Sendu lin ĉi tien, Mèlnikov'on,—aldiris maljuna serĝento: vere oni mortigos lin vane.

— Kiu estas tiu ĉi Mèlnikov!—Voĉjo demandis.

— Estas ĉe ni, via moŝto, tia malsaĝa soldato. Li timas tute nenion kaj nun ĉiam iradas sur korto. Vi bonvolu rigardi lin; li estas simila al urso.

Mèlnikov eniris la blindagon. Ĝi estis grasa (kio okazas tre malofte inter soldatoj) viro kun flavruĝaj haroj, kun granda frunto kaj kun grandaj helbluaj okuloj.

— Ĉu vi timas bombojn?—Voĉjo demandis lin.

— Pro kio timi bombojn! — Mèlnikov respondis, sin gratante,—oni ne mortigos min per bombo, mi scias.

— Ĉu vi dezirus vivi tie ĉi?

— Ha, certe, mi dezirus. Tie ĉi estas gaje!—li diris kuj subite ekridegis.

— Ho, necesas preni vin por atako! Ĉu vi volas, ke mi diru al la generalo?—diris Voĉjo.

— Kiel ne voli,—mi volas.

Kaj Mèlnikov kaŝiĝis post aliaj.

— Kartludu ni je nazoj, fratoj! Kiu havas kartojn? ekaŭdiĝis lia rapidema voĉo.

Efektive, kartludo komenciĝis baldaŭ en posta angulo,—aŭdiĝis ekbatoj per kartoĵoj je nazo, rido. Voĉo trinkis teon el samovaro, kiun la tamburisto pretigis, regalis la serĝentojn, ŝercis, interparolis kun ili. La soldatoj, rimarkinte, ke la sinjoro estas simpla, ankaŭ ekinterparolis kun li.

Cio tio ĉi tre amuzis Voĉon. Li ne nur ne sentis ian ajn timon aŭ malplezuron pro malvasteco kaj pro malbonodoro en la blindado, sed estis al li eĉ gaje kaj agrable.

Multaj soldatoj jam dormis. Vlang ankaŭ etendiĝis sur la planko; la maljuna serĝento, sterninte mantelon kaj farante krucajn signojn, murmuris preĝojn antaŭ dormiĝo. Voĉo ekdeziris eliri el blindado—rigardi, kio fariĝas sur korto.

— Forigu piedojn!—soldatoj ekkriis unu al alia, kiam li sin levis, kaj piedoj, alpremiĝante, donis al li vojon.

Vlang subite levis la kapon kaj ekkaptis Voĉon je basko de montelo.

— Nu, ĉesu, ne iru, — kiel eble! — li ekparolis per larma kompatema voĉo.—Vi ankoraŭ ne scias: tie bomboj falas senĉese. Ĉi tie estas pli bone...

Sed malgraŭ petoj de Vlang, Voĉo eliris el la blindado kaj sidiĝis sur la sojlo, sur kio Mèlnikov jam sidis.

Aero estis pura kaj freŝa, precipe post estado en la blindado: nokto estis hela kaj serena. Inter sonoj de

pafoj aŭdiĝis sonoj de veturiloj kaj parolado de homoj, laborantaj sur pulva kelo. Fajraj strioj de bomboj tra-kuradis sur stela ĉielo; supro de la pulva kelo vidiĝis antaŭe; sin klinintaj homoj aperadis kaj malaperadis preter ĝi, kaj iu en nigra palto staris sur la supro mem de la kelo, sub kugloj kaj [bomboj, kaj piedpremis teron, kiun aliaj homoj portis tien en sakoj. Bomboj ofte traflugadis kaj eksplodadis tre proksime de la kelo. La soldatoj, portantaj teron, sin klinadis, flankeniĝadis; la homo en nigra palto ne sin klinadis kaj trankvile piedpremis teron.

— Kiu estas tiu ĉi nigra? — Voĉo demandis Mèlnikov'on.

— Mi ne scias; mi ekiros rigardi.

— Ne iru! Malnecesas.

Mèlnikov ne obeis, sin levis, aliris al la nigra homo kaj staris apud li tre longe, tiel same trankvile kaj ne sin klinante.

— Ĝi estas kelisto, via moŝto,—li diris, reveninte:—oni trabatis la kelon per bombo, pro tio infanteriaj soldatoj portas teron.

Iafoje ŝajnis, ke bomboj flugis rekte al la pordo de la blindado. Tiam Voĉo alpremiĝadis post angulon kaj denove elstariĝadis, rigardante supren, ĉu ĝi ne flugas ankoraŭ ĉi tien. Kvankam Vlang kelkajn fojojn petegis el la blindado Voĉon reveni, li sidis tri horojn sur la sojlo kaj observis flugadon de bomboj. Je la fino de la vespero li jam sciis, de kie kiom da paflegoj pafas kaj kien iliaj pafaĵoj falas.

VII.

Alian tagon, je 27-a de aŭgusto, post dekhora dormo, Voĉjo, gaja, vigla, eliris frumatene sur la sojlon de la blindago. Multaj soldatoj ankaŭ eliris aeron, malgraŭ tio, ke bomboj ĉiam faladis ĉirkaŭ ili. Vlang ankaŭ eliĝis kune kun ili, sed ĉe unua sono de kuglo, li ekku-regis, trabatante al si vojon per la kapo, reen en blindagon ĉe ĝenerala ridado de soldatoj... Mèlnikov jam de plej frua mateno promenadis sur la baterioj, trankvile ekrigardante supren.

Apud la sojlo sidis du maljunaj kaj unu juna krispahara soldato el hebreoj, aldestinita tien-ĉi el infanterio. Tiu ĉi soldato prenis de tero unu kuglon, platigis ĝin per potpeco je ŝtono kaj eltranĉis el ĝi ion per tranĉilo; aliaj interparolis kaj rigardis lian laboron.

— Se ni restos ĉi tie ankoraŭ iom da tempo,—diris unu el ili,—ĉu limtempo de eksigo finiĝos al ĉiuj post paciĝo?

— Nu ne! Al mi estis restante ĝis eksigo kvar jaroj, kaj nun kvin monatojn mi servas en Sebastopolo.

— Cu ĝi ne alkalkuliĝas por eksigo?—diris alia.

Tiun ĉi tempon kuglego ekfajfis super iliaj kapoj kaj ekbataĝis tute proksime de Mèlnikov, aliranta al ili laŭ transeo.

— Ĝi preskaŭ mortigis Mèlnikov'on,—diris unu.

— Ĝi ne mortigos,—respondis Mèlnikov.

— Ne, frato, ĉiu monato alkalkuliĝas kiel jaro,—por tio estis ordono,—daŭris la interparolo.

— Nu, ĉiuokaze, post paciĝo oni nepre faros paradon en Varsovio en ĉeesto de la caro; se oni ne donos eksigon, donos senlimtempan rezervistan forpermeson.

Tiun ĉi tempon unu kuglo traflugis tute super iliaj kapoj kaj ekbatiĝis je ŝtono.

— Nu, eble, ankoraŭ ĝis la vespero vi ricevos plenan „eksigon“,—diris unu el soldatoj.

Ĉiuj ekridis.

Kaj ne nur ĝis la vespero, sed eĉ post du horoj du el ili jam ricevis plenan „eksigon“ kaj kvin estis vunditaj; sed ceteraj ŝercis kiel antaŭe.

Matene du bombardaj paflegoj estis riparitaj, tiel ke estis eble pafi el ili. Je la deka horo, laŭ ricevita ordono de la komandanto de la bastiono, Voĉjo elvokis sian komandataron kaj kune kun ĝi eliris sur la baterion.

La homoj tute ĉesis timi, ĵus kiam ili komencis labori. Nur Vlang ne povis superforti timon: li kaŝiĝis kaj kliniĝis ĉiam tiel same, kaj ankaŭ Vasin ĉiam maltrankviliĝis kaj eksidadis senĉese. Voĉjo estis tre gaja: eĉ penso pri danĝero ne venis en lian kapon. Ĝojo, ke li plenumas sian devon, kiel li pensis, ĝojo, ke li estas ne nur malkuraĝulo, sed eĉ kuraĝa, ke dudek homoj rigardas lin kun scivoleco,—ĉio tio ĉi faris lin tuta bravulo. Li eĉ fanfaronis je sia kuraĝeco, eliradis sur benketon kaj intence malbutonumis la mantelon por esti pri rimarkata. La estro de la bastiono, ĉirkaŭiranta tiun ĉi tempon sian mastrajon, ne povis ne admiri tiun ĉi beletan knabon, en malbutonumita mantelo, el sub kiu vidiĝis ruĝa ĉemizo, kun ekflamiĝintaj vizaĝo kaj okuloj, ekfrapantan

la manon je la mano kaj komandantan per sonplena voĉo: „unua, dua“ (ĝi signifas: unua paflego pafu, dua paflego pafu), kaj gaje surkurantan sur brustveron, por rigardi, kien falas lia bombo. Je la dekunua horo kaj duono la pafado silentiĝis, sed precize je dekdua komenciĝis atakego de Malaĥova kurgano—de dua, tria kaj kvina bastionoj.

VIII.

Sur tiu ĉi bordo de la golfo, sur monteto de telegrafo, tagmeze staris du oficiroj: unu—ŝipisto, rigardanta per lorno Sebastopolon, kaj alia—husaro, sur ĉevalo.

Ili rigardis sur tiun flankon de la golfo, sur Sebastopolon. Sur tuta linio de fortikaĵoj vidiĝis senĉesaj fajretoj de pafoj kaj blankaj densaj fumturniĝoj. Bruego de eksplodoj kaj de pafoj ne silentiĝis eĉ por unu minuto.

Post dekunua horo fumetoj montriĝadis ĉiam pli malofte, kaj fajfego fariĝadis pli malforta.

— Tamen dua bastiono jam tute ne respondas,—diris la husara oficiro, sidanta sur ĉevalo.—Ĝi estas tute disbatita, verŝajne.

— Ankaŭ la Malaĥova respondas al ĉiaj tri iliaj pafoj nur per unu,—diris tiu, kiu rigardis per lorno.

— Nu jen, kiel mi diris, ĉirkaŭ je tagmezo li ĉiam ĉesas bombardi. Hodiaŭ ankaŭ tiel same. Estos pli bone, se ne ekiros matenmanĝi,—nun oni jam atendas nin... Nenio estas interesa por rigardi.

— Ĉesu, ne malhelpu!—respondis rigardanta per lorno kaj komencis atentege rigardi Sebastopolon.

— Nu, kion? Ĉu estas movado en tranŝeoj, malamiĝoj iras?

— Jes, nun estas vidate,—diris la ŝipoficiro:—ili iras. Necesas doni signalon. Rigardu, rigardu, oni eliris el tranŝeo!

Efektive, estis vidate eĉ per simpla okulo, ke mallumaj makuloj moviĝis de la monto trans kavego el francaj baterioj al bastionoj. Sur bastionoj blankaj fumetoj de pafoj ekflamiĝadis en diversaj lokoj, kvazaŭ transkurante. Ekaŭdiĝis ofta pafila interpafado. Nigraj strioj de francoj moviĝis en fumo mem, ĉiam pli proksime.

La pafado fariĝis ĉiam pli forta. Fumo supreniĝadis ĉiam pli ofte kaj disvastiĝadis rapide sur linio; ie aperadis kaj malaperadis fajroj kaj nigraj punktoj; poste estis eble jam nenion kompreni, nur aŭdiĝis terurega krakado.

— Atakego!—diris la oficiro, kun paliginta vizaĝo, donante la lornon al la ŝipoficiro.

Kozakoj tragalopis laŭ vojo. Jen traveturis la ĉefkomandanto en kaleŝo kaj oficiroj rajde; sur vizaĝoj de ĉiuj vidiĝis maltrankviliĝo.

— Estas neeble, ke oni prenis!—diris oficiro sur ĉevalo.

— Je Dio, standardo estas ne rusa!.. Rigardu, rigardu!—diris alia,—franca standardo estas sur la Malaĥova!

— Estas ne eble!

IX.

Pliaga Kozelcev, nedorminta tutan nokton, matene ekdormis kaj dormis profunde, kiam aŭdiĝis fatala krio: „Alarmo!“

— Kiel vi dormas, Miĥajlo Simeðnoviĉ? Atakego!— ekkriis al li ies voĉo.

— Certe, ia petolulo...—li diris, malfermante okulojn kaj ne kredante.

Sed subite li ekvidis oficiron, kurantan, kvazaŭ sen konscio, de unu angulo al alia kaj kun tia pala vizaĝo, ke li komprenis ĉion. Li salte leviĝis de la lito kaj ekkuregis al la roto. Paflega pafado ĉesis; sed krakado de pafiloj estis fortega. Kugloj fajfis ne po unu, sed poamase, kiel aroj de aŭtunaj birdetoj, traflugante super kapoj. Tuta tiu loko, sur kiu lia bataliono staris hieraŭ, estis ŝirmita per fumo, aŭdiĝis krioj. Soldatoj, vunditaj kaj nevunditaj, poamase renkontiĝadis al li. Trakurinte ankoraŭ tridek paŝojn, li ekvidis sian roton, alpremiĝintan al muro.

Oni okupis Ŝvarcan reduton (tiel nomiĝis antaŭa reduto),—diris juna oficiro.—Ĉio estas perdita.

Kozelcev ekkoleris.

— Sensencaĵo!—li diris.

Li eltiris sian malgrandan feran malakran sabreton kaj ekkriis:

— Antaŭen, bravuloj! hurà-a!

Lia voĉo estis sonplena, laŭta. Li sin ĵetis antaŭen; kvindek soldatoj kun krioj sin ĵetis post li kaj elkuris

sur placeton. Kugloj ŝutiĝis, kiel hajlo. Du kugloj ekbatigis je Kozelcev, sed li preskaŭ ne remarkis ilin pro vervo. Antaŭe, en fumo, jam estis vidataj bluaj uniformoj kaj ruĝaj pantalonoj kaj aŭdiĝis nerusaj krioj; unu franco staris sur brustvero, svingis per sabro kaj kriis ion. Kozelcev kuris ĉiam antaŭen. Kelkaj soldatoj antaŭiĝis lin; aliaj soldatoj montriĝis de flanko kaj kuris ankaŭ post li. Bluaj uniformoj kuris de li reen al siaj transeoj; sub piedoj renkontiĝadis vunditaj kaj mortigitaj.

Kiam Kozelcev ĝiskuris jam ĝis lasta fosaĵo, ĉio miksiĝis ĉe li en okuloj kaj li eksentis doloron en la brusto. Past duonhoru li kuŝis sur portilo apud Nikolaa kazerono kaj sciis, ke li estas vundita; sed al li ne estis dolore,—li nur volis trinki ion malvarman kaj kuŝiĝi pli trankvile.

Malgrandeta grasa kuracisto, kun grandaj nigraj vangharoj, aliris al li kaj malbutonumis mantelon. Kozelcev rigardis trans mentono tion, kion la kuracisto faras al lia vundo, kaj vizaĝon de la kuracisto, sed li sentis nenian doloron. La kuracisto kovris la vundon per ĉemizo, viŝis fingrojn je basko de mantelo, kaj silente, rigardante la vunditon, deiris al alia. Kozelcev vidis, kiel la kuracisto, bandagante alian vunditon, montris sur Kozelcev'on kaj diris ion al pastro, staranta tie ĉi kun kruco.

— Ĉu mi mortas?—demandis Kozelcev la pastron, kiam li aliris al li.

La pastro, ne respondante, elparolis preĝon kaj donis la krucon al la vundito.

Morto ne ektimigis Kozelcev'on. Li prenis la krucon per la malfortaj manoj, alpremis ĝin al la lipoj kaj ekploris.

X.

Ne tia sorto atendis Voĉjon. Li aŭskultis fabelon, kiun Vasin rakontis al li, kiam subite oni ekkriis: „Francoj iras!“ Unuan sekundon li ektimis kaj ne moviĝis de loko; ekrigardinte ĉirkaŭe, li ekvidis, ke soldatoj trankvile butonumis mantelojn kaj eliĝis unu post alia. Voĉjo trankviliĝis. Unu soldato, ŝajnas, Mèlnikov, diris ŝerce:

— Eliru kun saluta pano-salo, bravuloj!

Voĉjo kun Vlang eliris el la blindago kaj ekkuris sur la baterion. Pafilega pafado estis jam nek de tiu nek de alia flanko. Voĉjo gaje alkuris al brustvero, apud kiu staris liaj bombardaj pafilegoj. Al li estis vidate klare, kiel francoj kuris rekte sur lin, kiel ilaj amasoj movetiĝis en plej proksimaj tranŝeoj kaj kiel iliaj bajonetoj brilis je la suno. Unu malaltkreska, kun larĝaj ŝultroj, kun spado, kuris antaŭe kaj transsaltadis kavojn.

— Pafu per kartoĉoj!—ekkriis Voĉjo kaj dekuris de benketo.

Sed soldatoj jam aranĝis sen li,—kaj metala sono de kartoĉoj ekfajfis super lia kapo komence el unu, poste el alia pafilego.

— Unua! dua! — komandis Voĉjo, transkurante de unu pafilego al alia kaj tute forgesinte danĝeron.

De flanko aŭdiĝis proksima krakado de pafiloj kaj

maltrankviliĝaj krioj. Subite de maldekstre aŭdiĝis terura krio de kelkaj homoj.

— Oni ĉirkaŭiras, ĉirkaŭiras!

Voĉjo ekrigardis reen. Dudek francoj montriĝis malantaŭe. Unu el ili, kun nigra barbo, bela viro estis antaŭ ĉiuj; alkurinte dek paŝojn antaŭ baterio, li haltis, ekpafis rekte Voĉjon kaj poste denove ekkuris al li. Unu sekundon Voĉjo staris kiel ŝtoniĝinta kaj ne kredis al siaj okuloj. Kiam li rekonsciiĝis kaj ekrigardis reen, bluaĵ uniformoj jam estis antaŭ li sur brustvero; du francoj vinktis pafilegon dek paŝojn de li. Apud li kuŝis Mèlnikov, mortigita per kuglo. Vlang ekkaptis ian bastonon kaj komencis furioze svingi ĝin.

— Post min, Vladimir Simeðnoviĉ, post min!—li kriis kaj svingis kontraŭ francoj.

Lia kuraĝeco konsternis ilin. Li ekbatis unu, antaŭan, je kapo, kaj aliaj haltis. Vlang daŭrigis ĉiam ekrigardi reen kaj krii:

— Post min, Vladimir Simeðnoviĉ! Pro kio vi staras? Kuru!

Li alkuris al tranŝeo, kie kuŝis la infanterio, pafante francojn. Ensaltinte en tranŝeon, li denove elstariĝis el ĝi, por rigardi, kion faras lia amata signojunkro. Kaj Voĉjo kuŝis, vizaĝo malsupren, sur tiu sama loko, kie li staris, kaj tuta tiu ĉi loko estis plenigita je francoj.

МЕЖДУНАРОДНЫЙ ЯЗЫКЪ.
Internacia lingvo.
ВЪ ИЗДАНИИ „ПОСРЕДНИКА“.

- 1) Н. Кабановъ. Вспомогательный международный языкъ эсперанто. Съ письмомъ Л. Н. Толстого объ языкъ эсперанто. Цѣна 12 коп.
N. Kabanov. Internacia helplingvo Esperanto. Kun letero de L. Tolstoj pri la lingvo Esperanto. Prezo 12 sd.
- 2) Н. Кабановъ. Первая эсперантская книга для чтенія съ грамматикой и словаремъ. Второе изданіе. Цѣна 25 коп.
N. Kabanov. Unua esperanta legolibro kun gramatiko kaj vortaro. Dua eldono. Prezo 25 sd.
- 3) Н. Кабановъ. Полная грамматика эсперантскаго языка. Съ примѣрами, упражненіями и съ переводомъ упражненій на русскій языкъ. Цѣна 40 коп.
N. Kabanov. Plena gramatiko de la lingvo Esperanto. Kun ekzemploj, ekzercoj kaj kun rusa traduko de la ekzercoj. Prezo 40 sd.
- 4) Л. Л. Заменгофъ. Основы Международнаго языка Эсперанто. Второе изданіе. Цѣна 35 коп.
L. L. Zamenhof. La fundamento de la internacia lingvo Esperanto. Dua eldono. Prezo 35 sd.
- 5) Н. Кабановъ. Самый легкій языкъ—Эсперанто. Самоучитель эсперантскаго языка для дѣтей, юношества и для всѣхъ, начинающихъ его изучать. Цѣна 35 коп.
N. Kabanov. La plej facila lingvo — Esperanto. Memlernolibro de la lingvo Esperanto por infanoj, gejunuloj kaj por ĉiuj komencantaj lerni ĝin. Prezo 35 sd.
- 6) Н. Кабановъ. Краткій русско-эсперантскій словарь. Цѣна 40 коп.
N. Kabanov. Rusa-esperanta vortaro. Prezo 40 sd.

Продаются въ книжномъ магазинѣ „ПОСРЕДНИКЪ“ (Москва, Петровскія линіи) и въ другихъ книжныхъ магазинахъ. Выписывать можно изъ главн. склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва, Арбатъ, д. Тѣстовыхъ, **И. И. Горбунову.**

ВСЕМІРНА БИБЛІОТЕКА ВЪ ПАМЯТЬ Л. Н. ТОЛСТОГО.
TUTMONDA BIBLIOTEKO JE LA MEMORO DE L. TOLSTOJ.

I. Tradukitaj de A. N. Ŝarapov.

- L. Tolstoj. Dio unu por ĉiuj (Surata kafejo) (Богъ одинъ у всѣхъ.)
Prezo 4 k. (5 sd.).
" Unu animo en ĉiuj (Одна душа во всѣхъ.) Prezo 4 k. (5 sd.)
" Unua ŝtupo, aŭ senmortiga nutrado. (Первая ступень.)
Prezo 10 k. (11 sd.).
-

II. Tradukitaj de N. Kabanov.

- L. Tolstoj. Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diros. (Богъ правду видитъ.)
Prezo 4 k. (5 sd.).
" Du maljunuloj. (Два старика.) Prezo 7 k. (8 sd.).
" Kie estas amo, tie estas Dio. (Гдѣ любовь, тамъ и Богъ.)
Prezo 6 k. (7 sd.)
" Sieĝo de Sebastopolo. (Осада Севастополя.) Prezo 15 k.
(17 sd.).
" Каŭказа militkaptito. (Кавказскій плѣнникъ.) Prezo 8 k.
(9 sd.).
" Per kio homoj estas vivaj. (Чѣмъ люди живы.) Prezo 7 k.
(8 sd.).

Estas presataj:

- Najivin. Pri kio steloj parolas. (О чемъ говорятъ звѣзды.)
Garŝin. Kvar tagoj sur kampo de batalo. (Четыре дня на полѣ сраженія.)
" Signalo. (Сигналъ.)
" Legendo pri fiero Ageo. (Сказаніе о гордомъ Аггеѣ.)
Semjonov. Kortisto (kun antaŭparolo de L. Tolstoj.) (Дворникъ.)
L. Tolstoj. Unua, dua, tria, kvara kaj kvina libretoj por infanoj.
(Книжки для дѣтей).

Libroj estas vendataj en la librovendejo „Posrednik“ (Moskvo, Petrovskija linii) kaj en aliaj librovendejoj. Por mendoj sin turni en la ĉefan librotenejon de la eldonoj de „Posrednik“: Moskvo, Arbato, 36, d. Testov, al I. I. Gorbunov.

Выписывать изъ главнаго склада изданій „ПОСРЕДНИКА“: Москва, Арбатъ, д. Тѣстовыхъ, **И. И. Горбунову.**

Цѣна 15 коп.

